# Biblia Revuo



**Volumo1**
**1964**

Redaktoro: Donald Broadribb
Melburno, Aŭstralio

Ĉi tiu teksto de *Biblia Revuo 1* estis preparita per la optika signo-programo ABBYY FineReader Express laŭ ekzemplero de la originala numero aperinta en 1964 .

## TABELO DE ENHAVO

LA T.N. UPPSALA-SKOLO KAJ ĜIA TRADICIHISTORIA METODO, de HELMER RINGGREN paĝo 1

CARL JUNG KAJ LA BIBLIO de DONALD BROADRIBB 13

SKLAVECO EN LA ANTIKVA PROKSIMA ORIENTO de ERNESTO JOZEFO GOERLICH 46

LA KOMISIIĜO DE PETRO de RODNEY E. RING 52

## LA T.N. UPPSALA-SKOLO KAJ ĜIA TRADICIHISTORIA METODO

**de HELMER RINGGREN**

Kelkfoje oni en malnovtestamenta esplorscienco parolas pri la "Uppsala-skolo", sed tiuj kiuj estas konsiderataj kiel ties anoj neas la ekziston de tia skolo. Eble kun iom pli da pravo oni povus paroli pri skandinava skolo kun repre-zentantoj tiel en Svedujo kiel en Norvegujo kaj Danlando. Malgraŭ tio oni devas konfesi, ke unu sciencisto el Uppsala pli konsekvence ol iu alia faris sin reprezentanto de ĉi tiu nova esplorbranĉo, nome la ĵus en siaj plej bonaj jaroj forpasinta profesoro Ivan Engnell.[1]

Se oni volas pli precize karakterizi ĉi tiun "skolon", oni tuj frontas alian terminologian malfacilaĵon. Engnell mem deziris plej volonte nomi sian metodon "tradicihistoria" sed samtempe malkaŝe konfesis sian apartenon al tiu metodo, kiu de sia brita kreinto S. H. Hooke estis etiketata "myth and ritual".[2] Kaŭze de tio oni ankaŭ ofte nomis la "Uppsala-skolon" la kultmitologia skolo.

Se ni restas ĉe la termino de Engnell mem, "tradici-historia metodo", ni baldaŭ trovas ke ankaŭ ĝi estas plur-senca kaj estas uzita en pluraj malsamaj signifoj. Kiam germanaj sciencistoj dum la lastaj jaroj okupadis sin pri "tradicihistorio", ili ĝenerale rigardis kiel sian taskon esplori sub kiuj cirkonstancoj iu teksto ricevis sian formon, kiun medion ĝi subkomprenas, kaj kion ĝi volas kaj celas. En tiuj kazoj, kiam du aŭ pli da tendencoj estas distingeblaj en la teksto, oni klopodas sekvi ĝian estiĝhistorion por vidi kiamaniere malsamaj situacioj unu post alia signis la tekston. Kelkfoje oni povas vidi kiel origina kerno iom post iom kreskas per la aldono de nova materialo kaj kiel samtempe la intenco de la rakonto ŝanĝiĝas. Ni prenu ekzemplon. Hoftijzer en iu verko[3] demandas — koncerne al la fojon post fojo ripetitaj promesoj al la patriarkoj ekposedi la landon Kanaan — unue, en kiuj lokoj ĉi tiuj promesoj vere plenumas funkcion en la rakonto, t.e. necesas

por la kunteksto? Li trovas, ke tiel estas nur en kelkaj malmultaj lokoj, kaj opinias, ke la promesoj origine troviĝis tie sed poste estis enmetataj en la ceteraj lokoj; tie ili estas "tradicihistorie duagradaj". Due li demandas: en kiu historia situacio estas verŝajne ke la izraelidoj precipe altetaksis ĉi tiujn promesojn kaj trovis necese speciale emfazi ilin? La respondo fariĝas, ke tio devas okazi en situacio, kiam ili staris antaŭ la risko perdi la landon (aŭ eble jam perdis ĝin).

Karakterize por ĉi tiu tipo de tradicihistorio estas, ke oni akcentas la **manieron** por la pluvivado de la teksto kaj la manieron en kiu la rakonto "kreskis" kaj kombiniĝis dum la paso de la tempo.

Aliaj sciencistoj, kaj precipe tiuj kiuj okupis sin pri la libroj de la profetoj, opinias praktiki tradicihistorion, kiam ili klopodas determini, kiuj kultaj kaj teologiaj tradicioj estas malantaŭ la mesaĝo de la profetoj kaj speciale malantaŭ la formo, kiun havas la mesaĝo. Oni tiel trovas, ke la profetoj ofte uzas esprimojn kaj stilformojn, kiuj estis kutimaj en la diserva vivo de ilia tempo, kaj ke ili grandmezure vivas de spirita heredaĵo, kulta kaj stilista tradicio, kiun ili ne mem kreis sed kiu estis la posedaĵo de Izraelo de longa tempo. La esploro de Beverlin pri la kondiĉoj por la proklamado de Miĥa[4] apartenas ĉi tie, samkiel la observaĵo de von Rad[5] ke Jesaja antaŭ ĉio estas dependa je du per la tradicio donitaj pensoj: Jerusalemo kiel la de Dio elektita kaj protektata urbo, kaj la Dia inaŭguro kaj la grandaj perspektivoj en la estonteco por la davidida regno. La ĉefakcento ĉikaze estas sur la senpera fondo de certa teksto, ne sur ĝia daŭrigita uzado kaj formiĝo.

En unu kazo oni do akcentas la pluvivadon mem kaj la manieron de pluvivado, en la alia tion de la tradicio donitan, la **enhavon** de la tradicio.

Engnell iamaniere kombinas tiujn du aspektojn kaj krome aldonas ankoraŭ kelkajn aferojn. Verŝajne estas plej

simple konstrui nian diskutadon sur lia propra prezento de la metodo en la artikolo “Tradicihistoria metodo” en **Svenskt Bibliskt Uppslagsverk** (Sveda Biblia Enciklopedio).[6] Li resumas ĝin en la jenaj punktoj:

1. La tradicihistoria metodo estas analiza metodo: necesas analizi la diversajn librojn de la Malnova Testamento kaj vidi kiel ili estas subkonstruitaj de pli grandaj rakontcikloj (ekz. la Ŝimŝon-ciklo, la Gideon-ciklo), aŭ kolektoj de profetaĵoj aŭ leĝoj, kaj tiuj siavice de unuopaj epizodoj, profeteldiroj aŭ leĝordonoj. Oni devas partigi la prezentadon al plej etaj eroj kaj demandi kiuj origine estis kunigataj kaj kiel premison havas unu la alian kaj kiuj konsistigas memstarajn unuojn. Oni devas demandi, kiamaniere la lingva formo de la diversaj unuoj estas kunligita kun iliaj funkcioj kaj celoj, kiujn ideojn (pensojn) ili respegulas kaj kiuj ideoj kaŭzis ilian kuniĝon al pli grandaj unuoj aŭ rakontcikloj ktp.

2. Ĉe tiu analizo la helpo de ĉiuj disponeblaj kriterioj devas esti uzata, oni devas observi kaj enhavon kaj formon, oni devas provi ekkoni laŭ kiuj principoj tradiciunuoj ligiĝas, oni devas atenti religihistoriajn paralelojn ktp.

3. La tradicihistoria metodo signifas ankaŭ **sintezon:** ne sufiĉas apartigi la diversajn unuojn unu de la alia, sed oni ankaŭ devas observi la koncernan kuntekston. Se oni ignoras la kuntekston, la rezulto estos kaozo.

Ĉi tie ni momente devas interrompi nian raporton por iomete komenti la tri ĉefpunktojn. En ĉi tiu mallonga, abstrakta formo ili ne impresas enhavi ion revolucie novan. La du unuajn regulojn ĉiuokaze Gunkel aplikis jam en sia klasika Genezokomentario, kaj se ni iros al ĝia pli moderna ekvivalento, la komentario de von Rad en “Das Alte Testament Deutsch” (La Malnova Testamento Germane) de 1949-53, ni trovos, ke li multe atentas ankaŭ la trian punkton. Tio eble distingiĝas precipe klare en lia trakto de la tekstparto pri la filoj de Dio kaj la filinoj de la homoj

en Genezo 6: 1-4, kie same la originaj motivoj pri la deveno de la gigantoj kaj la vivdaŭro de la homoj kiel la interpreto, de la kunteksto donita, pri la kreskanta malboneco de la homaro prezentiĝas; aŭ ĉe la tekstparto pri Noa kaj liaj filoj en 9: 20-27, kie estas montrite kiel tradicio, kiu origine referis al la situacio inter Izraelo kaj Kanaan, estis aldonata en la tradiciojn ĉirkaŭ Noa.

Efektive, granda parto de la programo de la Uppsala-skolo estas realigita en lastatempa germana verko de romkatolika aŭtoro.[7] Li konsideras ĉap. 3-10 de Juĝistoj, atentante la formon, stilon, kaj enhavon, kaj klopodas determini ĝuste kio estas originala en la diversaj literaturaj unuoj, kaj kio estas aldonita dum la pludonado; li ankaŭ konsideras pri kiam kaj kial la aldonoj kaj la transformoj de la originala materialo estis farataj. La sola mankanta afero estas religio-historia analizo kun referado al eksterbiblia materialo.

Sub tiaj cirkonstancoj ne estas tiel facile difini la diferencon inter la tradicihistoria metodo de la Uppsala-skolo kaj tiu uzata de aliaj, precipe de germanaj sciencistoj. Esenca diferenco verŝajne ekzistas en la emfazado de la kompontekniko mem, de la kaŭzoj **kial** la diversaj unuoj estis kombinataj tiel kiel okazis. Ĉe tio oni antaŭ ĉio akcentas tiajn trajtojn kiuj eble havas rilatojn al buŝa pludonado de la materialo. Ofte estas substrekite, ekzemple, ke du aŭ pli da origine memstaraj profeteldiroj estis kombinitaj tial ke ili enhavas la samajn vortojn (ŝlosilvorta principo). Ekzemple Jesaja 8: 9-10 estas memstara eldiro, ligita al la tekstparto 8: 5-8 tial ke ĝi enhavas la esprimon **ʻimmanu ʼel,** "Dio estas kun ni", samkiel alineo 8 havas la saman vorton, kvankam kiel nomon.[8] Jeĥezkel 33 estis ligita al ĉapitro 32 pro tio ke alineo 2 enhavas la vorton "glavo", kiu aperas ankaŭ en la lasta alineo de ĉapitro 32.[9]

Tiu rezonado en si mem ne estas nova, sed ĝi ricevis specialan akcenton ĉe Engnell kaŭze de la rolo, kiun li

donas al la buŝa pludonado: por povi konservi tiel grand**ajn** kompleksojn en la **memoro,** oni devas aranĝi la materialon tiel ke oni facile memoras ĝin. La ŝlosilvortoj ĉe tio estas granda helpo.

Pli grava kaj pli karakteriza estas alia trajto en la tradicihistoria ekzegezo de Engnell: la emfazo de la kulto kaj la sakrala reĝado kiel faktoroj kiuj kontribuis al la formado de tradicioj. Ekzemplo eble povas klarigi kion mi celas.

La interpreto de Engnell pri la Kain-Habel-epizodo en Genezo 4[10] celas ekspliki, ke malnovaj reĝritoj staras malantaŭe. Habel estas **ŝafisto,** kaj "ŝafisto" estas kutima reĝtitolo en la malnova Oriento. La murdo okazas "sur la kampo", kaj sur la kampo estas plenumataj la decidaj ritoj de la babela novjara festo, en kiu la reĝo ludas ĉefrolon. La morto de Habel verdire estas la anstataŭanta suferado kaj morto de la justa reĝo por lia popolo, kio en la festo unuflanke estis simbole prezentata, aliflanke estis plenumata per la ofero de besto kiel anstataŭigo de la reĝo. Kain devis fuĝi en la dezerton kiel krimulo, sammaniere kiel pastroj kiuj plenumis certajn gravajn pacigoferojn estas iamaniere rigardataj kiel krimuloj kaj devas fuĝi (ekzemploj troviĝas i.a. en Babel kaj la malnova Greklando). La signo, kiu protektos Kainon, estas Dia signo montranta ke li malgraŭ ĉio plenumis **sanktan** agon.

Engnell ne tute klarigas kiel — laŭ lia opinio — la historio evoluis el la supozata rito. Li nome akceptas ankaŭ la kutiman interpreton, kiu en Kain vidas la prapatron de la kenidoj, kiuj en historia tempo vivadis sen daŭra loĝloko en la dezerto kaj perlaboris kiel forĝistoj **(qajin** = forĝisto). Sed se la Kain-tradicio origine havis la celon klarigi la migrantan vivon de la kenidoj — en sia nuna kunteksto ĝi ja parolas pri la kreskanta malbono de la homaro — ĝi ja ne **samtempe** povas esti transskribo de rito per la ŝanĝo de kulta ago al historia. Pli verŝajne

oni tiam certe devas prezenti al si la aferon tiel, ke malnova rakonto pri la malbonfaro de Kain — kiel ekspliko pri la migranta vivo de la kenidoj — **formiĝis** laŭ la kategorioj de la reĝa kulto, ĉar tiuj estis bonkonataj de la rakontistoj kiuj pludonis la historion. (Ni ĉi tie ne penetros en la diskuton de la demando, ĉu tia rito entute ekzistis en Izrael; tio estas demando, kiu ne havas intereson en ĉi tiu konsidero pri **metodoj**.)

Laŭ la sama maniero ni verŝajne devas kompreni la ofte renkontatan eldiron, ke grandaj personoj en la prahistorio de Izrael, ekz. Abraham kaj Moseo, "estis prezentataj laŭ reĝaj kategorioj".[11] Tio devas signifi, ke la reĝeco estis institucio tiel grava, ke oni tutsimple ne povis imagi gvidanton kiu ne havas la funkciojn kaj ecojn de reĝo. Ankaŭ ĉi tie ni povas preteriri la demandon, ĉu tiu teorio estas verŝajna aŭ ne kaj ĉu la ekzistantaj faktoj ne povus esti alimaniere klarigataj.

Ni nun povas reiri al nia referado de la prezentado de Engnell pri lia metodo:

4. La tradicihistoria metodo estas bazita sur la rekono de la rolo de la buŝa tradicio ĉe la pluvivado de la malnovtestamentaj tekstoj. Fojon post fojo Engnell akcentas la jenon en siaj verkoj: la malnovtestamenta literaturo en superreganta parto reiras al buŝa tradicio, ĝiaj tekstoj ne estis skribataj rekte sed estis relative malfrua surpaperigo de materialo kiu longan tempon estis buŝe pludonata. La rakontanta literaturo estas kolekto de tradicioj, kiuj estis longe rakontataj buŝe de generacio al generacio. La profetoj estis predikistoj, kiuj ĝenerale ne skribis sian mesaĝon, sed ĝi pluvivis en la memoro de la aŭskultintoj kaj de la disĉiploj dum sufiĉe longa tempo ĝis ĝi fine estis kolektata kaj skribata.

Al tio devas esti menciate, ke la Uppsala-sciencistoj tute ne estas en akordo pri la rolo de la buŝa tradicio.

Lastatempe sufiĉe akra polemiko okazis inter Engnell, kiu akcentas la buŝan manieron de pludonado, kaj Widengren, kiu emfazas fruan notadon de la materialo.[12] Bedaŭrinde mankas ĝisfunda esploro de enbibliaj kriterioj por la pludonmaniero de tekstoj. Ambaŭflanke oni konstruas sian argumentadon sur paralelaj manifestaĵoj ĉe aliaj popoloj, sumeroj, araboj, iranianoj ktp. Sed tiaj paraleloj neniam povas fariĝi vere pruvaj, ekzistas neniuj garantioj ke la cirkonstancoj en Izraelo devas esti similaj al tiuj ĉe sumeroj aŭ araboj, eĉ kvankam la izraelidoj estis proksimaj al tiuj popoloj en tempo kaj loko aŭ kulturo. Esploro de tio, kiuj ecoj karakterizas buŝan respektive skriban pludonadon, ankoraŭ mankas. La artikolo de Culley en **Vetus Testamentum**[23] estas bona komenco sed multo restas. Esploro, kiu promesas fariĝi interesa, ankoraŭ en ĉi tiu printempo publikiĝos en Uppsala, kaj verŝajne estos kaŭzo por reveni, kiam ĝi aperis.

Buŝa kaj skriba pludonadoj devas esti rigardataj kiel du metodoj, kiuj sin kompletigas reciproke kaj kiuj povas ekzisti unu apud la alia. Oni sekve ne rajtas, laŭ Engnell, simpligi la aferon tiom, ke oni neas la ekziston de unu metodo tial ke oni rekonas la signifon de la alia. La decidon, laŭ li, oni devas fari de kazo al kazo. ĉi tie kompreneble la ĵus diskutita demando pri la kriterioj denove aktualiĝas. Oni tamen devas diri, ke en la praktiko Engnell plej multe akcentas la buŝan tradicion.

La buŝa tradicio estu rigardata kiel tre fidinda. En kulturo kiel la izraelida oni devas kalkuli pri pli granda kapableco konservi materialon en la memoro ol en la nia-tempa kulturo, kiu estas tute regata de la skribata vorto. Oni tial devas montri fidon al la donita tradicio eĉ kiam ĝi bazas sin sur buŝa pludonado.

Per tio ni traktis la esencojn en la priskribo de Engnell pri lia tradicihistoria metodo. Antaŭ ol lia metodo estas sufiĉe karakterizita, ni tamen devas kompletigi nian

prezenton per ankoraŭ unu vidpunkto, kiu fakte ne estas entenata en la nocio tradicihistoria metodo: la uzo de kompara materialo el la al Izraelo najbaraj popoloj por klarigi la religian vivon en Izraelo. Engnell mem aludas tion, kiam li sub punkto 2 mencias la "religihistorian interpretadon" laŭ la nova situacio, kreita per la myth-and-ritual-skolo aŭ la "modelismo".

Ni ĉi tie ne okupiĝos pri diskutado de la modelisma skolo ĝenerale sed nur klopodos skizi la aplikon kiun ĝi havis en la verkoj de Engnell. Ĝia ĝenerala premiso estas, ke kulturo kaj religio ĉe la diversaj popoloj de la malnova Proksima Oriento havas tiom da similecoj ke oni povas paroli pri komuna "modelo". La elementoj en la modelo, kiuj plej multe interesas Engnell, estas la jenaj: la novjarfesto kiel krea kaj rekrea kultdramo, la sankteca aŭ religia funkcio de la reĝo kaj la morto kaj la reviviĝo de la dio.

Koncerne al la novjarfesto, la babela akitu-festo fariĝas elirpunkto por la diskutado kaj ĉefmotivo tial iĝas la batalo kontraŭ kaoso, la potencoj de l' mallumo kaj morto, kies rezulto estas la kreiĝo de la mondo (al du aliaj motivoj ni revenos). Engnell kalkulas, ke Izrael havis duoblan egalaĵon al tiu babela festo: la festo de laŭboj en la aŭtuno kaj la pasko en la printempo. En la unua temas pri la venko de Jahŭe super la pramaro kaj pri la kreiĝo de la mondo, en la dua pri la subigo de Egiptujo kaj la Ruĝa Maro kaj pri la kreiĝo de la popolo. En ambaŭ kazoj Engnell imagas ke la fundamentaj okazaĵoj estis simbole aŭ "dramece" prezentataj en la ceremonioj de la festo por renovigi kaj ĉeestantigi ĝian enhavon kaj rezulton. Certamaniere tiu jarfesta teorio de Engnell povas esti rigardata kiel variaĵo de aliaj similaj teorioj kiuj estas kutimaj en malnovtestamenta esplorscienco, nome la teorio de Mowinckel pri surtroniro de Jahŭe ĉe la aŭtuna festo[13] kaj la teorio de Weiser kaj von Rad pri ĉiujara ceremonio por renovigi la interligon ĉe la sama festo.[14]

Ĉiuj tiuj sciencistoj nome klopodas rekonstrui la diservan vivon en Izraelo surbaze de laŭlitera interpreto de certaj psalmoj kaj aliaj nerektaj atestoj. La esenca diferenco fakte troviĝas en tio, ke Engnell substrekas ankoraŭ du aliajn trajtojn de la aŭtuna festo, nome la rolon de la reĝo kaj la motivon morto — reviviĝo.

Tiu fenomeno en la malnova Izraelo, kiu pli ol aliaj ensorĉis Engnell, estas la reĝado. Oni nun certe devas konsideri kiel pruvite, ke la reĝo en Izrael same kiel en la samperiodaj najbaraj landoj havis religiajn funkciojn, estis rigardata kiel de Dio vokita kaj elektita, estis rigardata kiel Lia "filo" kaj estis atendata per sia "justeco" respondeci pri la fruktodono kaj prospero de la lando.[15] El la imago pri la ideala reĝo elkreskis la espero pri venonta reĝo kaj savanto.[16] Precipe karakteriza por Engnell estas la teorio, ke la reĝo dum la novjarfesto devis subiĝi al simbola suferado por elaĉeti siajn pekojn kaj tiujn de la popolo, kaj ke tiu suferado estis perceptata kiel lia (simbola) morto kaj ke li el ĝi reiris al venko kaj vivo.[17] Li bazas tiun teorion precipe sur speciala interpreto de certaj psalmoj, kiuj parolas pri suferado, morto kaj restarigo (ekz. Psalmoj 22 kaj 89), kaj sur certaj aludoj en la babela novjarfesto. Li opinias, ke la Servanto de la Eternulo en Jesaja 53 estas plua evoluo de pensoj ligitaj al tiu anstataŭanta suferado de la reĝo (Mesio).[18] Interese estas, ke A. R. Johnson sen referado al eksterbiblia materialo kaj tute surbaze de interna interpreto de la psalmoj mem venis al sufiĉe similaj rezultoj.[19]

Laŭjuĝe la opinio de Engnell estas, ke oni en Izraelo sur la reĝon transigis motivon, kiu ĉe la najbaraj popoloj havis pli mitologian signifon: la morton kaj reviviĝon de la dio. Same Babel kiel la malnova Ugarit (Ras Ŝamra) konas dion, kiu mortas kaj revenas al la vivo, kiel simbolon por la velkado kaj la reĝermado de la kreskaĵoj. Tiu mito estis prezentata simbole—dramece en la kulto. En Izraelo, kie la penso ke Jahŭe povus morti estis absurda,

tiu motivo anstataŭe estis ligata al la reĝo.[20] Kiel tio fakte okazis Engnell ne klarigis, kaj ĝi ankaŭ verŝajne estas malforta punkto en lia religihistoria percepto de Izraelo.

Rilate al la mortanta dio Engnell volonte uzas la kunigantan nomon Tammuz. Nun tamen montriĝis, ke la sumer-babela Tammuz eble ne estis mortanta kaj reviviĝanta dio en tiu senco kiun Engnell imagis al si, kaj ke iuj de li uzitaj tekstoj ne rilatas al Tammuz, sed al alia dio sed se oni retenas en la memoro ke Engnell parolas pri tipo kaj ne pri la sumer-babela dio Tammuz, tiu kontraŭdiro ne fariĝas tiel grava. Ke en Ras Ŝamra oni konceptis mortantan kaj reviviĝantan dion estas plene pruvite. Engnell substrekis, ke multaj plorkantoj kaj profeteldiroj laŭ stilo kaj esprimmaniero memorigas pri tiu literaturo, kiu elkreskis ĉirkaŭ dioj de tiu tipo, t.e. plendado pri sufero kaj morto, vekrioj pri detruiĝo de urboj kaj pri la forvelkado de la kreskaĵoj[21] kaj la kantoj pri la suferanta servanto de la Eternulo.[22] Laŭŝajne Engnell ĉi tie simpligis sian problemon iom tro multe, kaj la realeco estas konsiderinde pli nuancita ol li premisas. Sed ĉi tie prezentas sin riĉa kampo al pluaj esploroj.

Entute oni eble povas diri, ke la "Uppsala-skolo" kulpiĝis pri certaj troigoj, sed ke ĝi ĝuste per tio atentigis la esplorsciencon pri gravaj problemoj, kiujn elstudi estas nepre necese.

* * *

**NOTOJ**

1. Libroj: **Studies in Divine Kingship in the Ancient Near East**, Uppsala, 1943; **Gamla Testamentet I**, Stockholm, 1945; **The Call of Isaiah**, Uppsala, 1949; **Israel and the Law**, Uppsala, 1954. Artikoloj: Kain och Abel. En rituell interpretation (**Svenska Jerusalemsforeningens Tidskrift 46**, 1947, p. 92-102); Profetia och tradition (**Svensk exegetisk arsbok** 12, 1947, p. 110-139); The Ebed Yahweh Songs and the Suffering Messiah in "Deutero-Isaiah" (**Bulletin of the John Rylands Library** 31,

1948, p. 54-93); Profetismens ursprung och uppkomst (**Religion och Bibel** 8, 1949, p. 1-18); Paesah-Massot and the Problem of 'Patternism' (**Orientalia Suecana** 1, 1952, p. 39-50); Planted by the Streams of Water (**Studia Orientalia loanni Pedersen**, 1953, p. 85-96); Knowledge and Life in the Creation Story (**Suppl. Vetus Testamentum III**, 1955, p. 103-119); Die Urmenschvorstellung und das Alte Testament (**Svensk exegetisk arsbok** 22-23, 1958, p. 265-289); Genesis — dess litterara och ideologiska problem (**Religion och Bibel** 18, 1959, p. 3-22); Methodological Aspects of Old Testament Study (**Suppl. Vetus Testamentum VII**, 1960, p. 13-30).

2. S. H. Hooke (red.), **Myth and Ritual**, 1933; **Myth, Ritual and Kingship**, 1958.
3. **Die Verheissungen an die drei Erzvater**, 1956.
4. **Die Kulttraditionen Israels in der Verkundigung des Propheten Micha**, 1959.
5. **Theologie des Alten Testaments**, II, 1960, p. 166 s.
6. 2a eld. red. Engnell, 1962-3 (=SBU).
7. W. Richter, **Traditionsgeschichtliche Untersuchungen zum Richterbuch**, 1963.
8. Engnell, **Gamla Testamentet** II, private presita 1947, neniam finita.
9. Art, "Hesekiels bok" en SBU (A. Carlsson).
10. En la art. Kain och Abel (vidu 1, supre); **Suppl. Vetus Testamentum III**, p. 117.
11. SBU art. Mose, kol. 149, art. Abraham kol. 13; kp. **Studies in Divine Kingship**, p. 174 s.
12. Widengren, **Literary and Psychological Aspects of the Hebrew Prophets**, 1948, Engnell, **The Call of Isaiah**, 1949, p. 55 s.; Widengren, **Acta Orientalia** 23. 1959, p. 201-262; Engnell, **Suppl. Vetus Testamentum VII**, p. 24 s.
13. **Psalmenstudien IV**, 1922. **The Psalms in Israelite Worship**, 1963.
14. A. Weiser, **Die Psalmen** (en **Das Alte Testament deutsch**) angla traduko 1963); von Rad, **Das formgeschichtliche Problem des Hexateuchs**.
15. S. Mowinckel, **He That Cometh**, 1956. ĉap. 3; R. de Vaux, **Les Institutions de 1'Ancien Testament**, I. 1958, ĉap. 5 (ankaŭ angla kaj germana trad.); G. Von Rad, **Theologie des Alten Testaments**, I, p. 317 s.
16. Mowinckel, **He That Cometh**, ĉap. 4-6; H. Ringgren, **The Messiah in**

**the Old Testament**, 1956.

17. The Ebed Yahweh Songs; Studies in Divine Kingship, k.c.
18. The Ebed Yahweh Songs; kp. Ringgren. **The Messiah**, p. 39 s.
19. A. R. Johnson, **Sacral Kingship in Ancient Israel**, 1955.
20. SBU, art. Religionsvetenskap kol. 716.
21. Ekz. Jes. 10: 28-33, ĉap. 24-27; 32: 9-10; 38: 10-20; Joel. Kp. Widengren, Konungens vistelse i dodsriket, en studie till Psalm 88, Svensk exegetisk arsbok 10, 1945, p. 66-81; G. W. Ahlstrom, Psalm 89, 1959 passim.
22. The Ebed Yahweh Songs.
23. R. C. Culley, An Approach to the Problem of Oral Tradition, en **Vetus Testamentum**, 1963, pp. 114-125.

# CARL JUNG KAJ LA BIBLIO

**de DONALD BROADRIBB**

La moderna mondo agnoskas tri personojn kiel fondintojn de psikanalizo: Sigmund Freud, Carl Jung, kaj Alfred Adler. El ili nur unu postvivis la duan mondmiliton, Carl Jung. La verkaro de ĉiuj tri estas tre ampleksa. Kune, ilia impreso sur la mondon estas probable la plej forta de ĉiuj modernaj sciencaj esploroj. Per ili analiza psikologio ĉesis formi parton de subjektiva filozofio, kaj fariĝis objektiva scienco.

Sigmund Freud estas bone konata pro sia kontraŭreligia sinteno.[1] Efektive, ankoraŭ nun inter teologoj oni plejofte trovas la supozon ke psikanalizo estas jam de sia fundamento rekte malamika al religio. Strange, Carl Jung estas ofte kalkulata kun Sigmund Freud kiel oponanto de teologio, fakto kiu kaj ĉagrenis kaj mirigis lin. Kaŭzo eble estas simple ke la laika publiko ne distingas inter la psikanalizaj sistemoj de Freud kaj Jung, sed ilin kutime kunŝovas en unu kategorion. Alia, tre grava, kaŭzo probable estas ke la terminologio kaj konceptaro de Jung estis tro "misteraj" por la laika publiko, kiu renkontis lin nur en ĵurnalraportoj kaj popularaj artikoloj.

Granda parto de la verkaro de Jung estas direktita speciale al la teologia publiko, kvankam ĝi restas ĝenerale nekonata tie.[2] Sed unusence, preskaŭ ĉio de li verkita havas religian karakteron, ĉar/lia analizo de religio firme lokigas ĝin inter la psikaj fenomenoj.

En ĉi tiu artikolo, kie mi esperas iom pli konigi la nociojn de Jung kaj, ĉefe, diskuti lian biblian studon Respondo al Ijob (nun parto de vol. 11 de la kolektita verkaro), mi unue klopodos prezenti la psikanalizan sistemon de Jung, kaj en dua parto konsideros la plej religi-rilatajn partojn.

Pri ĉiu homo oni povas diri, "por koni liajn ideojn, konu lian vivon." Tio nepre validas pri Carl Jung, naskita en 1875, filo de svisa protestanta pastro. En sia

aŭtobiografia rakonto li prezentas, en tre subjektiva formo, impresojn pri sia infana periodo, kiam formiĝis lia koncepto pri vivo kaj la mondo. La malakordo inter liaj patro kaj patrino, kaj la kreskanta religia dubo de lia patro, kaj evidenta kontrasto inter la teologia opiniaro de lia patro kaj ties religia praktikado, ne povis ne radike influi la filon. Kombine kun tio, Jung spertis fenomenojn kiujn li tiam interpretis kiel religiajn: li kredis ricevi rivelaciojn de Dio, kaj ili tute ne akordis kun la teologio ortodoksa de kristanismo. Aliaj spertoj, oftaj ankaŭ ĉe ni, kombiniĝis por direkti liajn pensojn al la karaktero de la menso, dum ĉe ni kutime ni klopodas ilin forgesi aŭ ignori.

Kiam necesis elekti karieron, konfliktis deziro kaj eblo. La deziro studi humanisman profesion (ekz. arkeologion), ne estis plenumebla, ĉar la proksima universitato estis malforta kaj mono mankis por iri al alia. Medicino ŝajnis la sola studtemo akceptebla, do li ĝin studis. En tiu tempo psikiatrio estis ankoraŭ relative nova, kaj ne formis gravan parton de la medicina kurso, tiel ke nur en la lasta parto de la lasta jaro Jung renkontis tiun temon. Li informas ke li tiam estis tre tedata de la profesoro, kaj nur serioze rigardis sian studlibron pri psikiatrio tuj antaŭ la ekzameno. Sed tiu lastmomenta studo ŝanĝis lian vivon. ĉar en tiu libro, kvankam ordinara studlibro ne tre atentinda, li ektrovis ke personoj efektive studas la menson kaj serioze konsideras la fenomenojn kiujn li mem, kiel infano, spertis. Post la ekzameno, kaj la diplomo, li malakceptis inviton servi kiel asistanto de medicina instruisto kiu nun laboradis kiel kuracisto, kaj anstataŭe komencis psikiatrian karieron.

Laborante en hospitalo por mense malsanaj personoj, Jung trovis ke la psikiatrio estas ankoraŭ tre nestudita afero. Plejofte la pacientojn oni ekzamenis fizike, kaj poste forgesis. Neniu pensis atenti la strangajn babiblaĵojn de la pacientoj, aŭ klopodis trovi la kaŭzon de la malsano.

Esplorado pri la mensaj malsanoj de la pacientoj, entuziasma legado kaj ĉampionado de la nova libro de Freud pri sonĝoj,[4] instruado pri psikiatrio en universitataj kursoj, kaj (fine) psikanaliza laborado privata, instigis la formuladon de ĝenerala psikologia teorio. Tiu teorio estas kelkrilate malsimila al tiu de Freud, sed esence havas komunan bazon. Oni ne tro maljustus al Jung, se oni dirus ke li estas kvazaŭ la filozofo de psikanalizado, kiu ekzamenis kaj interpretis kaj prezentis en maniero ne tre fremda al tiu de Platono. Kvankam pri detaloj Jung kaj Freud radikale diferencis, tamen al la laika leganto unuavide ŝajnas kvazaŭ ili forte interakordas, ĉar la kernon de la afero: la ekzisto kaj ĝenerala strukturo de la psiko, ili kune akceptis.

## La Psiko

Jung ĉiam insistis ke li estas sciencisto, kaj pro tio lia laboro devas havi empirian bazon. Observado, formulado de hipotezoj, aplikado de hipotezoj kaj revizio laŭ trovataj faktoj necesas. Tial, laŭ lia insisto, neniu loko restas por "kredo," "supozo," kaj "prefero" en psikologia laboro. Oni aŭ scias, aŭ akceptas kiel hipotezon. La esenco de la scienca metodo estas ĝuste tio.

Observebla fenomeno estas la psiko, t.e. la menso. Li preferis la terminon "psiko," ĉar la vorto "menso" en populara uzo havas limigitan sencon kiu ne bone taŭgas por la observataj faktoj. Kun Freud, li akceptis la observeblan fakton ke la psiko ekzistas kaj estas plenrajta: ĝuste la rilaton inter la psiko kaj fizika korpo li ne klopodis ekzameni, opiniante ke ne sufiĉa materialo haveblas por science esplori la aferon. Ke ekzistas rilato inter ili, ke unu povas influi la alian, estas klare. Sed kiel la medicino pristudas la korpon, tiel psikanalizo pristudas la psikon (menson).

La homa menso havas du aspektojn. Unu aspekton ni bone konas, la konscion. En populara uzo, "konscio"

estas preskaŭ identa kun "menso". Ni diras, "ĉu vi konscias pri …. ?" kaj ni per tio volas diri, "ĉu vi scias . . . . ? ĉu vi perceptas . . . . ? En nia epoko, kvankam iomete malpli ol en la 19a jarcento, rezonado, logiko, racia pensado estas la akceptata normo por laboro. Ni sekve kondamnas, se ni diras ke iu diro estas "nelogika," aŭ "neracia." La nekredebla kresko de scienco estas ŝuldata al rigora apliko de racia pensado.

La alia aspekto de la homa psiko estas ne bone konata, kaj kutime oni rifuzas agnoski ĝian ekziston, se la psikologo ne insiste montras ĝin al ni. Tiun aspekton ni facile povas nomi la "malkonscio". Ĝi ekzistas kvazaŭ aŭtonome en la moderna homo. Ĝi produktas sonĝojn, kaj revojn. Ĝi estas klare vidata se oni observas la parolon kaj agadon de "frenezaj" personoj, kaj de junaj infanoj. Ĝi parte respondas al la "instinkto" de bestoj. En tre populara libro, Freud ekzamenis la influon de la malkonscio en la ĉiutaga vivo, speciale en la funkcio de memoro kaj forgeso.[5]


Estas grave atenti ke la malkonscio estas kvazaŭ aŭtonoma. Ne estas eble al la konscio regi ĝin, kaj nur malfacile la enhavo de la malkonscio "erupcias" en la konscion, t.e. fariĝas konebla kaj ekzamenebla. Ĝi funkcias senĉese, tage kaj nokte, tiel ke oni povas diri ke laŭkvante la malkonscio konstituas la plej grandan parton de la psiko.

## La Malkonscio

Kvankam filozofoj jam de jarcentoj konsideradis la karakteron kaj enhavon de la konscia mondo, kaj sciencistoj ĝin ekzamenis diversmaniere, la malkonscio estas nur relative nova trovo: verdire, antaŭ Freud oni ne povas prave paroli pri scienca studo de la malkonscio, kvankam (kiel en ĉiu scienco) oni povas trovi kelkajn pli fruajn spurojn de tio.

Fariĝis kutimo ĉe Freud kaj ĉe Jung paroli pri la menso kvazaŭ tipografie: ili parolis pri "partoj" de la

psiko, kaj kelkfoje diagrame prezentis ĝin. Tio povas helpi la komprenon, sed ĝi kondukas al la risko ke oni forgesas la simbolan karakteron de la diagramo kaj komencas supozi ke la menso estas space dividebla. Tial, mi prezentas tian diagramon nur heziteme:




La senco de tiu diagramo estas simple ke la enhavo de la menso sume venas el du fontoj: parte el eksteraj impresoj (konscio), parte el arketipoj/instinktoj. Materialo formulita surbaze de la arketipoj povas kvazaŭ resti en la malkonscio (supre de la horizontala linio), aŭ povas penetri en la konscian menson (malsupre de la linio) en la formo de sonĝoj, "inspiroj," imagoj, bildoj, kc.

### Arketipoj

Kontribuo speciala de Jung al la psikanaliza studo estis firma formuligo de la arketipa fenomeno. La arketipoj ne estas originale trovitaj de li, kiel tuj agnoskas leginto de Freud (aŭ eĉ de Kant aŭ Platono), sed la definitiva prilaboro de la fenomeno estas de Jung.

Oni povas renkonti la arketipan fenomenon dumetode: analogie, aŭ empirie. Por klarigi la aferon, ni provu ambaŭ metodojn.

Analogie: konsideru ke la korpo havas heredatan formon. La genetiko prilaboras tiun fakton, kaj parolas pri genoj kaj kromosomoj kiuj portas en si la diversajn karakterizojn de la individuo. Kiam nova individuo naskiĝas, ĝi

ricevas sian korpon karakteron laŭ la gena konstituiĝo de la patro kaj patrino. ĉio, de la fakto ke normala individuo havas nur du brakojn, je certa loko, ĝis la fakto ke ties okuloj rezultas blukoloraj, estas determinita de la hereditaj genoj.

Apliku similan nocion al la menso: konsideru ke ekzistas iaj mensaj "genoj" kiuj determinas la formon de la menso de individuo. La mensa strukturo, siaparte, determinas la enhavon de la malkonscio, kiun ni vidas per sonĝoj kc. Tiujn "genojn" oni nomas arketipoj, Ili ne estas "pensoj" aŭ "ideoj" aŭ "konceptoj," sed la unuoj de la mensa strukturo, kiu formulas tiujn pensojn, ideojn, konceptojn,

Malfacile distingebla de la arketipoj, kaj pli-malpli entenata en la nocio arketipoj, estas la instinktoj. Sed gravas memori ke arketipo estas pli larĝa kategorio ol instinkto.

Empirie: la supre donita skemo estas helpo por kompreno de la nocio, sed ne prezentas la historie validan metodon per kiu oni formulis ĝin. La efektiva formuliĝo rezultis el bezono ekspliki tre interesan fenomenon, nome ke la samaj sonĝoj, mensaj bildoj, imagaĵoj aperadas en ĉiu homo, de ĉiu kulturo, epoko, kaj loko.

Kiel oni scias, Freud povis fari sian analizon de sonĝoj ĝuste ĉar la homa menso produktas similajn sonĝojn kun similaj etiologioj, negrave kie oni ilin serĉas.

La plej facila loko trovi tiujn mensajn bildojn estas en la parolado (kaj desegnado) de frenezaj personoj, kie ili ekstreme prezentiĝas. Ĝuste la idento inter la imagaĵoj de skizofrenuloj kaj de mitologioj antikvaj instigis la serĉon trovi la konekton inter ili. Krom la du menciitaj fontoj, oni povas ankaŭ rigardi literaturajn produktojn, speciale la "fantaziajn," ekz. fabelojn; artajn bildojn, speciale "esprimivajn" bildojn; timojn, supozojn, kaj kred-

ojn de junaj infanoj; kredoj de "primitivaj popoloj". Kaj ĉiu pastro, konsilante siajn zorgatojn, rapide trovas ke multaj "neraciaj" supozoj aŭ timoj plenigas la ŝajne bonstatan kapon de la konsilato.

Kiel ekspliki tiun fenomenon? Kaj kiel ekspliki ke Freud povis, surbaze de sia observado de pacientoj, formi generalan metodon kiu sukcese kuracas neŭrozojn? Zorga studo de la problemo kondukis al la arketipoj: arketipo estas la formo aŭ skemo, la inklino al certaj mensproduktaĵoj.

## Individueco

Ne estus ĝuste dividi la menson en nur du partojn, arketipoj kaj konscia observado, ĉar tio signifus ke la malkonscio estus identa en ĉiu homo. Tio estas empirie falsa. Kelkaj aspektoj de la malkonscio estas relative identaj en ĉiu homo, kaj kelkaj ne. Tial nia diagramo devus havi lokon por ankoraŭ alia parto de la malkonscio, la individua, propra enhavo.

Jung nomas la du "partojn" de la malkonscio la **kolektiva malkonscio** kaj la **individua malkonscio**. La kolektiva malkonscio estas la arketiparo/instinktaro, tiu karaktero de la menso kiu ankaŭ karakterizas ĉiun homon, kaj estas heredata. La individua malkonscio estas tiu propra karaktero de la menso, kiun havas individua persono kaj neniu alia. Estas probable ke la individua malkonscio inkludas impresojn ricevitajn el la konscio; forgeso kaj memoro tie rolas. Se oni volas dummomente forgesi la spacan simbolon, la individua malkonscio povus esti konsiderata sintezo de la konscio kaj' kolektiva malkonscio.

## Individuiĝo

Distingenda de la individueco supre konsiderita estas individuiĝo. Tiu similsona vorto havas sencon kiun ni devas aparte ekzameni.

## Carl Jung kaj la Biblio

La konscio estas, kiel reganta parto de la homa menso, relative nova en la historio. ĉu aŭ ne ĝi ekzistis latente jam de la komenco oni ne povas nun scii. Sed estas observeble ke dum la historio kaj antaŭ ĝi (kiel povas atesti arkeologio) iom post iom evoluiĝis en la homa menso aparta konscio. La frua homo estas distingebla per la fakto ke li konscie utiligis materialojn, faris artefaktojn. Efektive, ni inklinas difini la homon kiel faranton de artefaktoj, kaj supozi ke antaŭ la artefakta epoko la homo estis "besto". Sed kvankam la homo dum multaj jaroj ekzistis en pli-malpli "primitiva" stato, antaŭ kelkmil jaroj (malpli ol 12 mil)[6] ĝi komencis "civilizigi" sin, kaj agrikulturo baldaŭ sekvis. Diverskaŭze, kiel mi diskutos poste, oni povas diri ke la konscio kiel propra, aŭtonoma parto de la menso ekzistas de nur ĉirkaŭ 500 a.K,, en la "okcidenta kulturo" (t.e. la kulturo retreniranta al Egiptujo, Palestino, Mesopotamio, Grekujo). En nia kulturo la plena aŭtonomiĝo de la konscio ŝajne estis atingata je proksimume la komenco de la kristana periodo (kaj, laŭ Jung, estas la kaŭzo de la kristana periodo). Ĝi progresis pli kaj pli tiumaniere, ĝis la aktuala tempo. Aktuale, la konscia menso tiom regas niajn vivojn, ke ni nun rifuzas plejofte eĉ agnoski ke io alia en la menso ekzistas. Ni postulas por la ĉiutaga laboro nur konscian, logikan, "sciencan" metodon. Ĉar la "scienca metodo" rapide pruvas sian valoron, ĝi estas konstante pli honorata. En la lastaj kelkaj jaroj rigora apliko de la scienca metodo al la "humanismaj studoj" estis komencata, tiel ke nur nun komencas abundi verkoj pri filozofio, religio, lingvistiko, kc. kun plene scienca karaktero. Ke kelkaj ekzistis pli frue estas evidente; ke grandparte la publiko plu kontraŭstaras ilin estas ankaŭ evidente.[7] Sed la nombro rapide kreskas.

Aparta homo spegulas tiun evoluon per sia propra maturiĝo. En la infana periodo, homo estas ankoraŭ regata grandparte de sia malkonscio, fakto kio estas ĝenerale agnoskata ankaŭ de personoj al kiuj psikologia analizo estas fremda. Jure ni delonge akceptas ke infano ne re-

spondecas pri siaj agoj. La nekapablo de infano distingi inter fantazio kaj realo, kvankam oni tro forte emfazas ĝin, estas familiara temo en la literaturo kaj vivo de nia mondo.

La maturiĝo psika de persono okazas kiam la propra malkonscio de tiu persono, ties kolektiva malkonscio, kaj ties konscio kunatingas sian "finan formon," t.e. la formon akceptatan kiel normalan en nia aktuala mondo: la individuo ekzistas kiel io aparta, distingebla de la cetera homaro. En la menso de la maturiĝinta persono ne plu regas sola la arketiparo komune posedata kun la alia homaro, sed ekvilibrigas ĝin la propra konscio kaj la propra malkonscio. Tion oni povas nomi individuiĝo.

Necesas emfazi la vortojn menciitajn, **la formon akceptatan kiel normalan en nia aktuala mondo**. Ni erarus, aplikante la kriteriojn de psika matureco de nia epoko al alia epoko; aŭ de alia epoko al nia, Kiel dirite, la ĝenerala psika karaktero de la homaro rapide "sanĝiĝadis dum la pasintaj kelkmil jaroj, kaj la forta subteno donata de la mondo al konscio nun kontrastas eĉ kun periodo de antaŭ cent aŭ ducent jaroj. Simile, ni povas anticipi ke post jarmiloj la psika karaktero de la homo eble estos alia ol nun, kvankam pri tio ni ne povas certi.

## Sana kaj Malsana

Distingo inter la sana menso kaj la malsana estas malpli facila ol oni emus supozi. Cetere, estas eraro kunpuŝi ĉiun psikan misecon kaj supozi ke "mensa malsano" estas unusola afero, kio analogias al parolo pri "korpa malsano" sen distingo inter la kaŭzoj kaj karakterizoj de la malsanoj. ĉi tie ni ne konsideru pli detale tiun aferon, krom mencii ke "mens-kuracistoj" ankaŭ specialistiĝas—kion malklare ekperceptas la publiko, kiam ĝi rimarkas ke la stabano de la menshospitalo kaj la psikanalizisto ne estas sama persono; aŭ kiam ĝi rimarkas ke inter psiko-

logo, psikiatro, psikanalizisto, kaj psikoterapo estas diferenco.[8]

La konstituiĝo de la menso de maisana persono ne estas diferenca de tiu de sana persono, same kiel la korpo de malsanulo ne diferencas de la korpo de sanulo. La ofte ripetata aserto ke "Freud studis nur malsanulojn, do li ne trovis la karakteron de la sana menso" eraras, ĝuste ĉar Freud studis kaj serĉis ne nur la simptomojn de mensa malsano, sed la strukturon kaj karakteron de la menso. Eble estas dezirinde ankaŭ mencii ke Freud kaj Jung inkludis inter siaj studatoj grandan nombron da personoj kiujn oni ne nomus malsanaj.

La kriterio de mensa sano estas kompleksa, ĉar diversaj specoj de mensa malsano ekzistas. La plej familiara kategorio de mensa malsano, por la publiko, estas neŭrozo; la plej konata nomo de mensa malsano estas skizofrenio. Skizofrenio, laŭ Junga difino, estas malsano kaŭzita de erupcio de la malkonscio, en kiu la enhavo de la malkonscio sovaĝe kaptas la menson kaj regas ĝin. La fama **Simboloj de Transformiĝo** (vol. 5 de la **Kolektita Verkaro**) havas, kiel subtitolon, "Analizo de la Preludo al Kazo de Skizofrenio." En ĝi oni povas trovi konsideron pri la psikaj fenomenoj rilatantaj al tiu malsano. Neŭrozo estas ĝenerala termino por alia kategorio de mensa malsano. Ĝi estas la kategorio por kiu plej utilas la psikanalizisto.

Multaj el la fenomenoj de neŭrozo, laŭ Jung, ŝuldas sian ekziston al la stato kiu ekzistas en ĉies psiko: la divido inter la malkonscio kaj la konscio. La maniero kuraci neŭrozon inkludas komprenon, fare de la paciento, ke la malkonscio ekzistas kaj akcepton de tiu ekzisto kaj de la enhavo de la malkonscio. Minimuma kompreno pri la karaktero de la malkonscio kaj kion ĝi volas esprimi per siaj "fantaziaĵoj" estas necesa, por reakiro de mensa stabileco.

La psikanalizisto devas esti relativisto. Por li, kiel kuracisto, mensa ekvilibro aŭ stabileco estas la celo. Akcepto aŭ konformo al tradiciaj kredoj kaj vidpunktoj validas nur se ili helpas atingi tiun celon. Rezulte, ĉiu paciento devas ricevi individue mulditan kuracadon, kaj kion strebas fari la analizisto por unu persono li ne nepre strebas fari por alia.

## Religio

Ni nun estas pretaj konsideri la Jungan vidpunkton pri religio. Ĝuste ĉi tie la relativista vidpunkto de la psikanalizisto devas konfronti la absolutismon de la teologo, pli vere, de la tradicia teologo. Dum la analizisto akceptas kiel "hipotezon," la teologo akceptas kiel "kredon" aŭ "rivelaciitan veron". La terminologia bariero inter la du estas granda,

La homo kutimas projekcii la enhavon de sia malkonscio. Tio signifas, per pli simplaj vortoj, ke ĉar la malkonscio havas propran, kvazaŭ aŭtonoman karakteron (se ĝin konsideras la konscia menso), kaj ĝiaj arketipoj havas universalan karakteron, la homo inklinas trakti sian malkonscion kvazaŭ eksteran. Al ni estas familiara la fakto ke por primitivaj homoj (ĉu antikve, ĉu nun) sonĝo venas el ekstere: ĝi estas komuniko de ekstera individuo. Temas do pri opinio aŭ vidpunkto: en nia aktuala, modern-"okcidenta" kulturo, ni rigardas internen, kaj agnoskas ke la fonto de la sonĝo kuŝas en ni; dum en la antikva kulturo ni rigardis eksteren, kaj opiniis ke la fonto kuŝas ekster ni. Por ni restas egale nekonata kaj mistera tiu fonto.

Oni povus diri ke religio estas tiu scienco kiun konstruas la homo kiu rigardas eksteren, dum psikologio estas la scienco kiun konstruas la homo kiu rigardas internen.

La ĉefa arketipo, la arketipo kiu plej interesas la ekzamenanton de religio, estas tiu pri la **memo.** Per pli simpla terminologio, la malkonscio mem, ĝia ekzisto kaj ĝia karaktero, estas la plej impresa fakto direbla pri ĝi.

## Carl Jung kaj la Biblio

En periodo kiam la malkonscio estas la plej eminenta faktoro en la psiko, la homo kiu rigardas ĝin kiel eksteran "projekcias ĝin". Tio estas, li kvazaŭ vidas ĝin en la ekstera mondo. Vido (kaj aŭdo) rolas tre forte en primitiva religio. La vizio estas, psikanalize, enhavo de la malkonscio interpretata de la konscio kvazaŭ ĝi vidas la enhavon. La skizofrenulo vidas viziojn; la juna infano vidas viziojn; la primitiva homo vidas viziojn; la antikva religio abundis je vizioj. En la aktuala mondo vizioj rolas nur ĉe la mense malsana, la juna infano, kaj tre rare en religiaj manifestacioj (speciale en la Romkatolika religio). Simile pri aŭd-fenomenoj.

En periodo kiam la malkonscio rolas malpli eminente, kaj la konscio rolas kiel "reganto de la psiko" (kvankam tio estas vanta supozo ĝia), la projekcio ŝajnas "superstiĉa" aŭ erara. Precize ĉar la konscia menso, kiu rigardas nur al la ekstera mondo, ne povas trovi la menciitajn fenomenojn (kiuj originas en la malkonscio, do interne de la homo), ĝi rifuzas kredi ilian ekziston. Sed ĉar la malkonscio ja ekzistas, kaj ĝi plu regas la homon dum granda parto de ĉiu tago, kaj ĉar la malkonscio neniam ĉesas aktivi sed estas nur subpremata de la konscia menso dum la veka periodo, tial ekzistas la danĝero ke la menso dividiĝas en du tute apartajn sekciojn. Tiu danĝero, kiu estas granda, kondukas al patologia stato grava. Tial, kiu kredas al pura "raciismo," kaj kredas sin 100%e "sciencista" nur trompas sin.

Konsiderante, dum momento, nur la terapion de danĝera stato kiu ekzistas en ĉiu moderna homo, necesas trovi metodon por refari ligon inter la konscio kaj malkonscio. Sed tiu ligo devas esti tia, ke ambaŭ konservas sian ekziston. Necesas trovi metodon kiu interpretas kaj utiligas la "postulojn" de la malkonscio por la konscio. Denove, parolante **nur** pri terapio, kaj nenion dirante pri la metafizika vero aŭ falso de la metodoj, oni povas konstati ke tradicie religioj rolis precize tiel. "Religio estas tiu

scienco kiun konstruas la homo kiu projekcias". Religio kaj psikanalizo ambaŭ tute serioze pritraktas la malkonscion. Per simboloj kaj ritoj kiuj estas ne raciaj (ĉar ne de la konscia menso) sed nur parte raciaj, religio faras ponton inter la malkonscio kaj la konscio. En la katolika religio, kiu konservas la antikvajn simbolojn kaj ritojn plej pure el la kristanaj grupoj, la ligo estas tre forta. Tiom, ke, laŭ la agnosko de Jung, inter kredantaj katolikoj la bezono por psikiatro estas preskaŭ nula. Bone instruita, inteligenta katolika pastro, kiu uzas la rimedojn de la eklezio plene (ĝiajn simbolojn, ritojn, kaj — speciale — la konfesion) por la ekleziano, estas adekvata por la psikologia bezono de tiu ekleziano. Kondiĉo, evidente, estas nur ke la ekleziano mem devas plenfirme akcepti kaj kredi la Eklezion.

Ankoraŭ parolante nur pri terapio, ni devas rimarki ke la supraj kondiĉoj aplikeblas al nur minoritato de la aktuala homaro. La nominala katoliko, la protestanto, kaj la nekristana mondo ne profitas per ĝi. Kaj, statistike, tiu dua grupo estas la plej rapide kreskanta. Por ili, kaj plej speciale por la persono kiu perdis (aŭ neniam havis) akcepton de la simboloj, kredoj, kaj ritoj: por la persono kiu ne projekcias, kiu rifuzas kredi ke ekzistas io "supernatura" en la ekstera mondo (kaj plejofte ankaŭ rifuzas ke ĝi ekzistas en la interna mondo), psikanalizo ŝajnas la sola adekvata terapio.

Ĝis nun mi parolis nur pri terapio psikologia. Kaj mi krude aplikis la relativismon kiu necesas por la diskuto. Nun ni devas ekzameni ĝis kiom tiu relativismo estas pravigebla, kaj poste konsideri la rilaton inter ĉio ĉi kaj "metafizika realo".

Oni povas defendi relativismon dirante ke la psikanalizisto estas kuracisto, ne teologo. Tial li uzas tion, kio al li ŝajnas efika, sen konsidero pri la origino aŭ teoria valideco de la medikamento. Sed estus maljuste lasi la

aferon tiel. Jung firme havis konvinkon ke kvankam lia relativismo estas pravigebla scienca (sciencisto devas esti relativisto rilate al siaj sciencaj studoj), tamen li povis esti "relativista" nur ĉar lia psikanaliza studo kaj religio estas du aspektoj de tute sama afero. La diskuto devos esti iom detala, sed tio estas necesa por bona kompreno.

Unue, la realeco de la psiko kaj la enhavo de la psiko estas konstatenda. Diri ke io estas nur "mensa," aŭ nur "psikologia" estas kutimo nia, kaj ni populare diras tion por indiki ke ni opinias ke la afero estas malvalida, aŭ senekzista. Tiu populara parolkutimo, kiu fontas el tro granda adoro al la konscio kaj manko de agnosko pri la ekzisto de la malkonscio, estas erariga. Ni devas forviŝi ĝin. ĉio estas mensa, en la senco ke ni konas la mondon nur per percepto, kaj ni perceptas per la menso kiu ricevas la sensimpresojn kaj ilin interpretas.

Arketipo estas muldilo en la malkonscio. Oni povus kompari ĝin kun skizo de inĝeniero. Se inĝeniero montrus skizon pri domo, oni scius rigardante la skizon nur ke oni vidas bildon. ĉu ekzistas la domo sendepende de la bildo oni ne scius. Oni devus demandi, aŭ serĉi. En la konscia menso povas esti ideo. Ekzemple, ke sciuro kuras sur branĉo de arbo. ĉu tiu ideo konformas al la ekstera mondo aŭ ne oni ne scias, krom se oni demandas pli. Oni povas paroli pri la sciuro en la ekstera mondo, kaj demandi pri ĝia ekzisto. Sed pri la sciuro en la ideo, en la konscia menso de la persono, oni ne povas disputi: la ideo pri sciuro ekzistas. En la malkonscia menso povas esti, ni diru, "ideo". Ĉu tiu ideo estas "nur ideo," t.e. ekzistas nur en tiu menso, aŭ reprezentas ion ekster la homo, ni ne povas diri sen konsideri la apartan ideon kaj ekzameni la aferon. En la malkonscio estas arketipo. ĉu la arketipo prezentas ion eksteran?

Ĝuste tiun demandon la sciencisto ne povas respondi, ĉar al li mankas rimedoj por fari la ekzamenon. Li do

devas resti senresponda. Kiel sciencisto, li nur povas diri "mi ne scias". Se la arketipo estas science utila, li povas formi hipotezon pri ĝi, estante preta forĵeti la hipotezon favore al nova kiam necesos.

La fakto ke arketipoj estas universalaj, neeviteblaj konstituaj partoj de la homa menso, donas probablecon ke ili ja reprezentas ion. Sed tio estas nur ia statistika probableco, kaj ne utila por scienca studo.

Freud kaj Jung komune identigis la di-koncepton kun projekcio de la psiko. Tio estas, ili ambaŭ trovis ke la koncepto pri dio, kiu ekzistas en religio, estas psikologie analizebla kiel projekcio de la malkonscio-konscio-kombinaĵo. La antikva homo, vidante ekster si tion kio estas interne, donis al ĝi la nomon dio. Sed dum Freud opiniis ke temas pri primitiva/progresa dikotomio, Jung opiniis alie. ĉar ankaŭ la psikanalizo estas scienca hipotezo, kaj ni ne havas kaŭzon por supozi ĝin pli valida ol religia sistemo. Laŭ Jung, kiel sciencisto li nur povas fari difinon:

**Psikologiaj termino: Projekcio de la Memo = religia termino: Dio**

sed ĉu oni akceptas la dekstran aŭ maldekstran parton de la ekvacio kiel komencon, kaj legas la alian flankon kiel la "difinon" dependas de onia vidpunkto.

Se ni diras, per iom tro simplaj vortoj, ke ekzistas en la malkonscio arketipo, kaj ke tiun arketipon per projekcio la antikvuloj nomis dio, kaj se ni ne faras konkludon pri la metafizika valoro de tiu arketipo, la psikologo kaj la teologo staras sur komuna teritorio kaj povas interparoli. Eble estas komfortige scii, ke ankaŭ en la fizikaj sciencoj oni projekcias arketipojn, kaj estus ŝoke al la fizikisto lerni ke la psikologo konsideras multajn el liaj "leĝoj de la naturo" projekcioj de arketipoj en la malkonscio. Se oni memoras tiun fakton, estas pli facile kompreni kiel la analizisto kaj la teologo povas interkonversacii.

## Carl Jung kaj la Biblio

Kiam do la psikologo, t.e. Jung, konsideras religiajn fenomenojn, pritraktas religiajn kredojn, aŭ diskutas religian historion, li do uzas terminaron kaj analizon kiuj unuavide ŝokas la teologon. Sed se la teologo memoras ke la psikologo esprimas per terminaro kaj sistemo de analizo la samajn aferojn kiel la religio per aliaj terminaro kaj sistemo, pli facile komprenemas.

Por la persono kiun kontentigas la tradiciaj simbolaro, ritaro, kaj kredaro, la religio validas. Tio aplikeblas al multaj personoj en nia mondo nun, kiel antaŭe, kaj ĉiam restos tiel dum la futuro. Por la persono kiun kontentigas nur rezonado el la sciencoj, por kiu la malnovaj simboloj ne havas efekton, la religio ne povas validi.

Nepre substrekendas ke mi ne parolas pri metafizika vero. ĉu aŭ ne religia kredo havas universalan veron ne estas diskutate. ĉu Kristo ja mortis por forporti pekojn, ĉu Dio per bapto nuligas pekon, ĉu post la morto la homa spirito devos esti ekzamenata, aŭ punata, ĉu ekzistas senmorta animo, kc. ne estas la temo ĉi tie. Pri tiaj aferoj nenio estas dirita, kaj nenio dirita estas aplikebla. Ili estas temoj el la teoiogia mondo, kaj nur laŭ tio ke individua persono nun, ĉi tie, estas ekzamenata, la psikologo kaj la teologo renkontas unu la alian.

Ke la psikologo esprimas la motifon "forporto de pekoj" kc. per siaj vortoj kaj analizo ne signifas ke la teologia esprimo estas "falsa," nur ke ĝi estas alia sistemo.

Ĉe, do, ni diru, vizio spertita de religiulo, en kiu estis rivelaciata io (ni pensu, pri, ekzemple, la vizioj pri Mario vaste konataj), la psikologo kaj ia teologo unuavide ŝajnas esti malamikoj, sed efektive estas amikoj. La psikologo analizas la aferon, dirante ke la arketipa enhavo de la malkonscio de tiu persono erupciis tiel forte, ke ĝi kaptis la tutan menson de tiu persono kaj trudis al la konscio impresojn. Li eble esploras la arketipan enhavon kaj kataloge priparolas ĝin. La psikologo nenion diras pri ĉu la arketipa enhavo originis en objektiva Di-sperto. Li, kun

la teologo, akceptas ke la enhavo de la vizio ne originis en tiu individua persono mem. Laŭ la psikologo, ĉar ĝi estas arketipa enhavo, ĝi estas parto de la kolektiva malkonscio. Ĝin ne kaŭzis aŭ kreis tiu individuo. Kio ĝin kaŭzis aŭ kreis li ne povas diri. Al la teologo li diras: jes, se vi volas esprimi la aferon dirante ke Dio manifestaciigis komunikon al tiu individuo, vi plenrajte povas tion diri. Mi plene akordas kun vi. Kion vi nomas Dio, mi nomas "arketipo en la kolektiva malkonscio," sed tio estas nur pli sciencsona nomo, kaj mi ne intencas diri per ĝi ion alian ol vi diras per "Dio". Kaj al la raciisto li diras: jes, se vi volas esprimi la aferon dirante ke la persono suferis halucinacion, kaj supozis vidi ion kio venis efektive el la menso mem, mi plene akordas kun vi. Kion vi nomas "menso," mi nomas "psiko," kaj mi science analizas ĝin. Mi dirus ke la vizio estas rezulto de transiro de enhavo el la malkonscio en la konscion, du partoj de la menso.

Se vin ĉagrenas tiu "duobla vizaĝo" de la analizisto, estas bone demandi al vi mem, pri la kaŭzo de tiu ĉagreno. ĉu vin ĉagrenas, ĉar vi ne ŝatas la relativismon, la diron ke du partioj kiuj sin opinias malamikoj tamen ambaŭ pravas? Se jes, do necesas memori ke tiu estas scienca relativismo, kaj sen atenco al la vero de la diroj.

Sed pli probable vin ĉagrenas, ĉar vi suspektas ke li "favoras" la "raciiston". Kaj se tio kaŭzas vian ĉagrenon, vi bone agus se vi ekzamenus vin mem, kaj demandus ĉu tiu "favoro" kuŝas en vi, kaj ne en la analizisto. Vin kaptis la furioza emfazo pri racio de la moderna epoko, tiom ke vi identigas la racian analizon de la mondo kun la mondo mem. Laŭ vi, racio estas malamiko de malracio, kaj el la du supraj diroj (al la teologo kaj al la raciisto) unu devas esti honesta kaj unu nur trompa.


Sed se vi estas tute ne ĉagrenata de la "duobla vizaĝo," vi probable komprenas ke li egale honeste parolas al ambaŭ, ĉar li ne opinias ke ili estas du apartaj diroj, sed du aspektoj de sama afero.

## Carl Jung kaj la Biblio

### La Biblio

Se oni volas kompreni la Biblion, oni devas kompreni la homojn kiuj verkis la Biblion. Tio ne signifas ke oni devas malakcepti ĉian teorion pri inspiro. Kontraŭe, unusence Jung estis la plej fervora subtenanto de la vidpunkto ke oni devas konsideri la Biblion la produktaĵo de inspiro. Li vidis sin, foje, kiel preskaŭ solan "krianton en la dezerto" favore al inspiro, en epoko kiam la "liberala" skolo kaj protestanta kaj katolika pli kaj pli inklinas vidi nur homojn malantaŭ la Bibliaj paĝoj.

Kio do estas inspiro? Ĝi estas, laŭ la tradicia kristana opinio, ago de Dio, kiu "kaptas" la psikon de persono kaj plenigas ĝin, kaŭzante tion, kio alie ne estus farata. Per psikologia terminaro, ni dirus ke inspiro estas, simile, "kapto" farita de potenco ne origininta en la konscia menso, kaj ne individue posedata de persono. Ĝi estas, do, kapto farita de la kolektiva malkonscio, aŭ — pli ĝuste — de parto de la kolektiva malkonscio. Kiel dirite supre, Jung lasas al la leganto decidi por si mem, ĉu metafizika Dio konektendas kun tiu (parto de la) kolektiva malkonscio. Diagrame ni povus skizi:




estas, do, en la unua parto de la diagramo loko por metafizika Dio; scienca studo ne povas konfirmi aŭ malkonfirmi ĝin, konsekvence en la diagramo estas (?) ĉe tiu loko.

La psikologo rigardas la Biblion fenomenologie, t.e. rigardante la aktualan formon de la biblia teksto, kaj ana-

lizante laŭeble la rilaton inter tiu tekstformo kaj la konata strukturo de la homa menso. Sekve, li ne faras deklaron pri la origino de la materialo, ĉar li ne faras deklaron pri la origino de la menso: ĉar tio estas nuntempe science neekzamenebla. En la kadro de la aktuala scienco, tamen, li povas multon diri por helpi al kompreno pri la Biblio.

**La Respondo al Ijob** estas la plej konata verko, en kiu Jung analizis biblian problemon: ĝi estas verko en kiu li klopodis adopti teologian situacion, kaj uzi la teologiajn sinonimojn por la psikologiaj terminoj. Ke la libro estas ankoraŭ nevaste konata (ĝi aperis en 1952) probable estas kaŭzita de la fakto, ke la laika publiko kaj la teologia publiko ambaŭ ne sufiĉe konas la psikanalizan metodon de Jung (kaj Freud) por kompreni ĝin.

La demando, al kiu respondas la **Respondo al Ijob,** temas pri la karaktero de Dio. La centra problemo en Ijob, kiel Jung vidas ĝin, estas la ŝajne duobla karaktero de Dio. Dio estas, unuamane, bona, kaj, duamane, malbona.

En la prologo al Ijob (ĉapitroj 1-2) kaj la epilogo (ĉapitro 42: 7-17) ni lernas la efektivan kaŭzon de la aflikto kiu trafas Ijobon. La kaŭzo ne kuŝas en Ijob, sed en la ĉiela mondo, en Dio mem. Laŭ la teksto, la aflikto venas al Ijob ĉar Dio kaj la Diablo disputas pri Ijob, kaj la Diablo ricevas permeson klopodi logi Ijobon al blasfemado per ĉia artifiko (nur ne mortigo). Sed kiam ni pensas iom pri la afero, nin frapas la konstato ke ni simbole parolas: ĉar Judismo kaj Kristanismo estas monoteismaj. Ekzistas nur unu dio, nur unu ĉiela estaĵo. La "Diablo" ne estas sendependa dio, kiel eble en la zoroastra religietoso el kiu venis la koncepto, sed nur aspekto de Dio. Simile, en Judismo, anĝeloj estas ne sendependa, aparta afero, sed Dio mem.[9] Dio mem afliktas Ijobon, farante tion por certigi al si mem ke Ijob estas fidela.

La aflikto estas grandioza, kaj inkludas murdon (la tuta familio de Ijob estas murdata), ŝtelon (ĉiu posedaĵo lia

estas detruata aŭ rabata), turmenton (lia edzino, kaj liaj amikoj, malsimpatias kun li kaj klopodas devigi lin konfesi nefaritajn krimojn), cerblavon (en la fino de la verko, Dio aperas al Ijob, sed anstataŭ ekspliki aŭ respondi al Ijob, superfortas lin kaj per minacoj devigas lian akcepton de la dia arbitreco).

La centra demando en la tuta libro estas: kiel povas dio justa kaj bona sendi tian aflikton. Ni, la legantoj, scias la respondon: ĝuste Dio ne estas justa — la tuta aflikto okazas pro vetludo inter Dio kaj Satano. Prave oni tradicie vidas en la libro Ijob diskuton pri la problemo kaŭzata de la ekzisto de malbono en la mondo.

En la moderna mondo ni inklinas malakcepti la ideon ke ekzistas objektiva malbono: ĉia malbono fontas en la homo, diras ni. Dirante tion, ni kvazaŭ supozas ke ni eksplikas ĝin. Sed tio ne estas kristana ekspliko.

Tra la tuta libro Ijob estas konvinkita pri unu afero: ke la aflikto ne estas senkaŭza. Se nur, li diras, Dio mem venus kaj parolus, defendus sin, eblus kompreni la aferon. Ĉar Dio ne estas maljusta (vidu Ijob 10: 2-8; 13: 2-3, 18-23), kaj oni povas apelacii al li sukcese (19: 25); tamen sperto pruvis al li ke estas senutile tro esperi (ĉapitro 9). Ijob apelacias al Dio, kaj samtempe scias ke Dio ne helpos, ĉar Dio mem kulpas.

Estas grave rimarki, ke la religia kredo pri Satano malfortiĝis kaj (plejparte) malaperis el la kristanismo precize en la periodo kiam homoj plej diable kaj infere aktivadas (kp. la nazian reĝimon de Hitler; la preparon kaj preton uzi kemiajn kaj biologiajn militilojn; la ekstermadon de milionoj da personoj per militoj, kc). Tiu fenomeno ne estas sen kaŭzo. La antikva simbolo (satano) perdis sian gravon por la homaro, kaj estas nun anstataŭata de alia simbolo (en Germanujo hitlera, la "juda minaco"; en la okcidento, "komunismo"; en la oriento, "kapitalismo) **kiu egale forte regas la vivojn de la homoj kiel** la

antaŭa **satan-simbolo** (kp. Efesanoj 2: 2). Estas alloge diri ke nur la ekstera simboligo ŝanĝiĝis, sed la esenco restas sama. Efektive, kiam oni rigardas la fanatikan fervoron kiu kaptas homojn kaj kaptis homojn, oni povas kompari ĝin nur kun la iama "demon-posedo". Ni ne parolas pri mense malsanaj personoj: ne psikozaj pacientoj respondecas pri la afero. Se tiel estus, ni devus nomi "psikozaj" grandegan parton de la "normala" publiko. Regas la personojn ia neindividua potenco, ili, kiel konsciaj, raciaj personoj ne respondecas pri siaj agoj.

Kio do estas? La teologo inklinus simple diri ke "satano, simbolata per aliaj nomoj, plu agas". Li pravus, parolante kiel teologo. (Notu ke la "materialisto" povus: egalrajte diri ke "persona psikozeco iam estis nomata demon-posedo" kaj, efektive, tiel oni kutimis ekspliki la fenomenon pli frue en ĉi tiu jarcento.) Alia interpreto, tiu de la psikanalizo, celas sencigi kaj la respondon de la teologo kaj de la "materialisto".

La kolektiva malkonscio estas senmorala. Tiu unusola konstato simpla estas ŝlosilo al multaj fenomenoj. Moralo, bono kaj malbono, estas kriterio de la konscia menso. (Kp. Genezo 3:5).[10] Ankaŭ la persona malkonscio (pri kiu traktis Freud) konas moralajn kriteriojn. Sed la arketipa strukturo de la malkonscio, la kolektiva malkonscio, ne ilin konas. Kiam la materialo venanta el la malkonscio estas reguligata, formata kaj utiligata, de la psiko laŭ pozitivaj direktoj, ĝi povas ricevi moralan formon kaj esti progresiga. Tio okazas, ekzemple, en religia sistemo efika. Sed kiam la materialo el la malkonscio erupcias, kaj venas laŭ nuda, senmorala formo, la rezultoj povas esti katastrofaj. Egale, kiam la psiko estas nete dividita en du apartajn fakojn, konscio kaj malkonscio, kie la konscio estas laŭ eble plej malvarma kaj "racia," moralo mem malaperas. Oni povas diri, kelkrilate, ke moralo aperas kiam la konscio kaj malkonscio interagas.

## Carl Jung kaj la Biblio

En nia epoko, kiam la malkonscio estas konstante malagnoskata, ni vidas la venkon de kruela, malvarma, “racia” konscio (kiel en hitlera Germanujo), aŭ de neregata erupcio de la malkonscio (kiel en la psikozulo), aŭ de demonsimila kulto (kun politika aŭ alia bazo): en ĉiu kazo senmorala.

Tiom pri nun. Sed la satan-simbolo interesas nin, ĉar ĝi estas ŝlosilo al la problemo en Ijob. Kiel dirite, la kolektiva malkonscio estas senmorala. En epoko kiam la konscio ankoraŭ ne estis tiel klare difinita kiel nun, kiam la kolektiva karaktero ankoraŭ estis tre evidenta, kaj la “instinktoj” multmaniere regis la vivon, la di-koncepto, kiu estas projekcio de la malkonscio, estis unueca, kaj inkludis kaj bonon kaj malbonon. Tial, la paganaj dioj estis mem tute senmoralaj. Precize pro tio, Platono tiel furiozis kontraŭ la greka mitologio, ĉar la grekaj dioj estis nepre ne imitindaj: plej malbonaj modeloj por la infano edukata. En la Biblio, en la plej fruaj rakontoj, ni vidas restaĵon el ĉi tiu “primitiva” dikoncepto, kvankam plejparte la Jhŭh de la Malnova Testamento estas koncepto multe progresinta super tiu de la paganaj dioj.

Ni vidas restaĵojn el la malnova, primitiva koncepto en rakontoj en Eliro 4: 24-26, Juĝistoj 11: 29-40, Numeroj 16: 20-35, kc. La sama dio kiu estis la paragono de virto kaj moralo estis samtempe fonto de nekredeble malmoralaj agoj (kp. ankaŭ Genezon 6: 1-7).

Sed la primitiva dikoncepto ne restis en Judismo. Kun la kresko de la konscio en la homo, la kolektiva karaktero de la religio komencis malkreski (kutime oni nomas la epokojn de Jeremia kaj Jeĥezkel; komparu la eventojn de la intelekta vivo en Grekujo, por trovi paralelan fenomenon). Neeviteble, la dikoncepto, estante projekcio, devas speguli la evoluon psikan. Jam en Jeremia ni trovas semojn de teologia revolucio, kaj komprenon ke la malnova dikoncepto ne estas adekvata (8: 18-22, 14: 8-9, 15: 18,

17: 17-18, 20: 7, kc). ĉi tiu materialo, verkita ĵus antaŭ la ekzilo, devus doni al ni ideon pri kio okazos. En la ekzila periodo la malnova dikoncepto tute malaperis, kaj la Judismo adoptis relative novan koncepton el la Zoroastrismo: el la religio kie du dioj, unu simbolanta lumon kaj unu simbolanta mallumon, postenis, Judismo adoptis modifon monoteisman. La du flankojn de Dio, luman kaj malluman, oni personigis.[11]

Sed en Ijob, verkita dum la ekzilo, aŭ tuj poste (kelkaj, ne multaj, preferas lokigi la verkiĝon de Ijob en la tempo de Jeremia, sed tio estas neprobabla), la duobla di-persono de la prologo ne estas akceptata en la korpo d« la poemo mem. Tie la reganta koncepto estas, flanke de la amikoj de Ijob, ke Dio estas la plenjusta, plenbona, paragono morala. Sekve, malbono veninta de Dio povas esti nur puno pro ia misfaro homa. La sama koncepto daŭris, modifite, ankoraŭ en la teologio de Faŭlo, kaj eĉ pli en ia teologio de la aŭtoro de la Letero al la Hebreoj, kaj en kelkaj nuntempaj teologoj, laŭ kiuj la homo estas jam en sia naturo mem pekoplena kaj kondamnita de Dio.

Ijob ne kapablis akcepti la argumenton de la amikoj, ĉar (laŭ Ia hipotezo de Ja rakonto mem) li estis senkulpa, perfekta ĉiurilate. La malbono veninta de Dio ne povis esti puno, laŭ la premisoj de la rakonto. Sekve ĝi estis intence sendita de Dio. Do, Dio estis ankaŭ malbona, kaj ne nur bona. Tiu dilemo, spegulanta la kreskantan kondiĉon de la konscio kaj la rezultantan kreskon de etiko kiel teologia kaj filozofla fako, estas la kemo de la problemo de Ijob.

Kian respondon oni povas doni al Ja problemo? Tradicie kristanoj diras ke la Malnova Testamento estis preparo por la nova: la antikva Judismo estis preparo por Kristo. Tiu respondo estas pli valida ol oni ofte supozas. Por kompreni la kaŭzon de mia diro, necesas ekzameni la Novan Testamenton, kaj speciale la centran figuron en ĝi, Jesuon.

## Carl Jung kaj la Biblio

Kio plej frapas la leganton de la novtestamenta materialo estas la mitologia karakterizado de Jesuo. Tiom forta estas la mita aspekto, ke iam (dum la 19a jarcento) populariĝis supozo inter radikalaj legantoj ke Jesuo mem estis "nur mito". Sed tio maljustas kaj al la Nova Testamento, kaj al la personoj de tiu epoko. Necesas diferencigi inter mita karaktero kaj mita karakterizo: kio frapas la leganton estas la mita karakterizado. Tio estas, ke la verkantoj de la materialo skribis pri Jesuo uzante mitologiajn motifojn (virga naskiĝo, releviĝo el la mortintoj, eksterordinara saĝo dum la infana periodo, mirakloj, kc). Ni parolas nur pri la maniero uzita de la verkantoj por skribi pri Jesuo, ni nenion diras pri Jesuo mem. Kiel insiste indikis Jung en sia libro pri "Flugantaj Teleroj,"[12] oni povas multmaniere skribi pri ĉiu evento. Kio nin interesas estas la mensa karaktero de la verkantoj, kio ilin interesis, kio al ili estis plej grava. Al ili estis grave atribui al Jesuo la karakterizon kiun oni antaŭe uzis por abundaj dioj kaj kultoj en la antikva mondo. La diferenco estis ke ili atribuis tiujn karakterizojn al vera persono, al homo vivinta nur 30-70 jarojn antaŭ la tempo de la verkado.

Unualoke: Jesuo estis la Savanto. Sed de kio li savis ? Estas malfacile respondi tion logike, kaj la mutaj klopodoj ekspliki la karakteron de la "Elaĉeto" fiaskis, dum la kristana historio. Kelkaj vidis en la afero kvazaŭ negocon kun la Diablo; aliaj vidis Jesuon kiel la Grandan Modelon imitendan de homoj; aliaj vidis Jesuon kiel la Oferon faritan de Dio al Dio por kompensi la homajn pekojn; kc. La neeblo fari logikan eksplikon kontentigan al ĉiu devus haltigi nin. Estas klare ke al la unuaj kristanoj Jesuo estis la Savanto, kaj ke tio multon signifis al ili.

Gnostika teologio, poste, vidis Jesuon kiel Savanton laŭ tio ke li savis la homojn el la manoj de la malnovtestamenta dio, kiu estis kruela kaj furioza. Sed la Eklezio, prave, malakceptis tiun interpreton. Sed unusence la Biblio deklaras ke Jesuo ja savis nin de Dio, t.e. de la

furiozo, la kolero de Dio. (Vidu Mateo 3: 7, 12; 7: 19-27; Apokalipso 2: 12-17; Romanoj 5: 10-11; 2 Korintanoj 5). Tamen Dio mem estas la aŭtoro de tiu savo: li ne nur agis per Jesuo (v. 2 Korintanoj — sed li ja estis Jesuo (Johano 10: 30; 8: 12; Filipianoj 2: 6-11). Teologie, do, Dio savis la homaron de Dio mem. Kiel ofte rimarkite, tio estas nelogika: kial bona Dio devus savi homojn de si mem? Denove ni estas en la mondo de Ijobo, kun la sama problemo.

La respondo estas ke ni staras antaŭ empiria fakto, kaj ne logika rezonado: la personoj de tiu epoko sentis bezonon esti savataj. Ni konas tiun saman situacion nun, sed nia teknologia epoko projekciis tiun savfiguron ne sur teran homon, sed nur pseŭdosciencan kreaĵon: Flugantaj Teleroj, raketŝipoj, kc. — la sama strebado atingi la ĉielon.

La situacio tiam estis simila al la nuna: morala kaoso tra la tuta mondo; estas rimarkinde, kiom da simileco troveblas inter la hitleraj torturoj kaj psikozaspekta traktado de la judoj, kaj la spektakloj dum la roma regno (ia gladistaj bataloj, la nerona persekuto, kc). Mi intence parolas nur pri eventoj okazintaj antaŭ 20 jaroj, kiujn nun agnoskas ĉiu homo. Sed oni povas facile en la aktuala periodo trovi amasskale similan agadon, ĉu oni rigardas al Vjetnamo, ĉu aliloken. Socia dekadenco abismis.[13]

Ankoraŭ pli, la kresko de la konscio en la homa psiko necesigis unuigan figuron, kiu povus rekombini la partojn de la menso, kaj fari kunlaboradon ebla inter la malkonscio kaj la konscio. Kiel jam menciite, la iama religia sistemaro perdis sian valoron por la homoj, ankaŭ en Judujo kie la Templo fariĝis profitdona komercejo (kp. Luko 19: 45-6), la religia instruo amaso da harfendaj sencaĵoj (kp. Marko 2: 23-8), la teologio disputata (Luko 20: 27-40), la administracio korupta (ĉefpastreco estis politika posteno).
La juda sopiro al Mesio, tio estas, Savonto, estis forta en multaj sektoj, kiel ankaŭ ekster la Judismo. Sed estas

memorende ke la juda Mesio estis ne pura "religia" figuro, sed socia fenomeno, kiu ŝanĝos la tutan socian strukturon. Se ni memoras tion, ni pli facile komprenas la karakteron idealan de la Mesio, kaj tiel la faktorojn kiuj necesigis tiun idealon.

La Dikoncepto estas projekcio de la Memo. En pli frua epoko (antaŭ Jeremia, speciale), kiam la homa konscio ankoraŭ ne sufiĉe diferenciĝis, tio ne kaŭzis problemon. Sed kiam la konscio apartiĝis, diferenciĝis, la di-koncepto devis suferi; ĝi povus esti nur projekcio de la malkonscio, de la konscio, aŭ de ambaŭ. En la praktiko, ĝi iĝis projekcio de la tuta psiko, kaj konsekvence disiĝis en partojn. En la malfrua Judismo, tuj antaŭ la kristana periodo, la teologio agsoskis tri apartajn diojn, aŭ hipostasojn diajn: Jhŭh, la Diablo (Satano), kaj Ĥkmh ("Saĝo," kiu rolas nur iomete en la Biblio, en la plej malfruaj libroj. ekz. Sentencoj, sed kiu rolas plenforte kiel aparta Diino en la intertestamenta literaturo). Unuiga faktoro necesis, kaj, parte, Jesuo plenumis tiun rolon por la kristanoj.

Kun kelkaj esceptoj, ekz. la letero de Jakobo, emfazo estas donata en la Nova Testamento al la duobla karaktero de Dio, la origino de tio kion ni nomas bona kaj malbona (ekz. Mat. 5: 45; la tuta Apokalipso; Johano 1:3; Luko 16: 1-9; kc). Tio estas, oni emfazas la totalan rolon kaj karakteron de Dio. Sed laŭ la novtestamenta teologio, Jesuo faras pli ol nur tion: li donas al la homoj kapablon venki la kaoson kaj dekadencon de la mondo.

Tio eblas, ĉar Jesuo, en la vido de la novtestamentuloj, estas la surteriĝo, la "enkarniĝo" de Dio. Li estas homa %uro konscia, kiu vidigas la arketipon kiu kutime restas malkonscia.

Ĉu tio do signifas ke Jesuo estas nur imagaĵo, io senvalora ? Ribelis kontraŭ tio Jung, tiel:

> Kiel, do, oni povas "senmitigi" la figuron de Kristo? Raciista provo fari tion tute elsorbus la

misteron de lia karaktero, kaj restus ne plu la naskiĝo kaj tragika fato de Dio en tempo, sed (historie rigardate) malbone dokumentita religia instruisto; juda reforminto, kiun oni greke interpretis kaj miskomprenis — ia Pitagoro, eble; aŭ, se vi preferas, Budho aŭ Mohamedo — sed nepre ne Filo de Dio, aŭ Dio enkarna. Nek, ŝajne, oni komprenis kia estus la konsekvenco de Kristo el kiu ĉia eskatologia infekto estas ekstermita. Hodiaŭ ni havas empirian psikologion kiu daŭre ekzistas, kvankam la teologoj forte strebas ignori ĝin, kaj per ĝia helpo ni povas ekzameni mikroskope iujn el la diroj de Kristo. Se tiujn dirojn oni tirus for de la mita kunteksto, oni povus ilin ekspliki nur personece.[14] Sed kian konkludon ni nepre ricevos, se tia deklaro, kia "Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi" estas reduktata al personeca psikologio? Evidente la saman konkludon, kiun faris la parencoj de Jesuo, kiam, ne sciante pri la eskatologio, ili diris, "Li frenezas". Kiel utilus religio sen **mythos**, ĉar religio signifas, se ĝi ion ajn signifas, precize tiun funkcion kiu konektas nin nun la eterna mito?

Konsciante tiujn multsignifajn neeblojn, oni supozis, eble pro kreskanta malpacienco pri la malfacila fakta materialo, ke Kristo estis nur mito, tiukaze ne pli ol fikcia. Sed mito ne estas fikcio: ĝi konsistas el faktoj konstante ripetataj kaj observeblaj ĉiam nove. Ĝi estas io okazanta al la homo, kaj homoj suferas mitajn fatojn tute kiel la grekaj herooj. La fakto ke la vivo de Kristo estas grandparte mita precize neniom malpruvas ĝian faktan veron — tute male. Mi eĉ aŭdacas diri, ke la mita karaktero de lia vivo estas ĝuste tio kio esprimas ĝian universalan homan validon. Estas tute eble, psikologie, ke la malkonscio aŭ arketipo plene ekposedu homon kaj determinu ties faton ĝis la plej eta detalo.  Samtempe objektivaj, nepsikaj

> paralelaj fenomenoj povas okazi reprezentante la arketipon. Ne nur ŝajnas tiel, simple estas tiel, ke la arketipo plenumigas sin ne nur psike en la individuo, sed objektive ekster la individuo. Mia propra konjekto estas ke Kristo estis tia ulo. La vivo de Kristo estas ĝuste kia ĝi devis esti por esti la vivo de dio kaj homo samtempe. Ĝi estas **symbolum,** kunmeto de heterogenaj naturoj, kvazaŭ Ijob kaj Jahŭe kombiniĝus en unu persono. La intenco de Jahŭe homiĝi, rezultinta el sia kolizio kontraŭ Ijob, plenumiĝas en la vivo kaj suferado de Kristo.[15]

Jesuo, do, en la biblia materialo estas duobla: homo ("plene homo, kiel ankaŭ plene Dio," diras antikva kredkonfeso eklezia), sed ankaŭ plenumas la mitologiajn motifojn atribuitajn al dioj. Krome, en la Nova Testamento, li plenumas la mesiajn motifojn kribritajn el la Malnova Testamento, kiel ankaŭ la Anthropos-motifon kc. Ni ne povas demandi, ĉu tiu bildo estas reala? Ni ne povas demandi tiel, ĉar la respondo estas evidenta: la bildo estas psik(ologi)e reala. Ni povas do ekzameni ĝin, ekzamenante la mensojn de la personoj kiuj havis la bildon, kaj lernante la signifon de la bildo al ili.

## Teologia Valoro

Rigardinte la pensojn de Jung, se nur malvaste kaj surface, ni devas nun pritrakti la temon: kiel la psikanaliza konsiderado de la religia kaj biblia materialo valoras por la teologo, kaj ĉu la kristana teologo povas ĝin akcepti ?

Antaŭ ol respondi tiun demandon, necesas iom heziti kaj zorge pensi. Unuavida, tuja respondo plejofte estas erariga, kaj ni devus esti zorgoplenaj kiam temas pri tiel grava kaj serioza afero.

Post longa konsidero, mi estas konvinkita ke la respondo devas esti afirmativa, kvankam kun iom da rezervo.

Por ekspliki tion mi ripetu ion jam kelkfoje diritan, ke la psikanaliza studo mem ne celas pritrakti objektivajn metafizikajn faktojn sed la homan reagon al faktoj (ĉu aŭ ne metafizikaj). Jung plurfoje menciis ke la epistemologia problemo ankoraŭ ne estas solvita. Tio estas, nek la scienco, nek la filozofo kontentige respondis la demandon: per kio oni akiras scion, kaj kiom oni povas fidi la "scion"? La aktuale kreskanta relativismo en la sciencoj emfazas la fakton ke multo, kion oni iam supozis firme sciata estas nur "relative" vera aŭ valida. Almenaŭ unu universitata instrulibro pri fiziko rifuzas paroli pri vero, kaj nur parolas pri "validŝajnaj hipotezoj."[16] La historiisto scias kiom malfacile estas distingi inter opinio aŭ interpreto kaj "solidaj faktoj."

Konstatinte tion, Jung rifuzis konsideri metafizikan veron, ĉu sciencan, ĉu religian, ĉu filozofian. La koncepto "materio" estas egale duba kaj disputebla kiel iu ajn religie metafizika hipotezo; ĝi estas science metafizika hipotezo, scienco estas la ekvivalento en nia kulturo de religiaj sistemoj en aliaj kulturoj. Ju pli oni emas plene fidi kaj sendemande akcepti "sciencon," des pli oni dubinde agas. Rezulte de sia sinteno, Jung suferis la dilemon ke lin nomis "mistikulo" kaj "metafizikisto" la scienca mondo, kaj "ateisto," "materialisto" la religia mondo. Ambaŭ, siaflanke, postulas akcepton ke ili mem posedas la veron, kaj ke dubeti pri ĝi oni ne rajtas.

La teologo farus grandan eraron, se li postulus ke Jung estu ortodoksa kristano, antaŭ ol ĝi akceptus lian laboron kaj utiligus ĝin. Efektive, Jung ne estis kristano, li opiniis la kristanan teologion plurrilate mankoplena kaj ne adekvata por la aktuala epoko. Sed fari tian postulon estus simile al postuli ke ĉiu arkeologo estu ortodoksa kristano, aŭ ĉiu lingvisto. La metodojn kaj laborojn oni ja povas utiligi — ju pli honesta kaj komprenema estas la laboranto, des pli lia laboro estas uzebla ankaŭ de personoj kun alia vidpunkto— kaj la interpreto pri la laboro kiun oni faras estas afero propra de la koncerna teologo.

## Carl Jung kaj la Biblio

Jung lasas grandan truon en sia psikanaliza studo: la ĉefan parton, koncerne religion, li intence lasis duba. Oni povas, kun Freud kaj la sekvantoj de Freud, decidi ke la "arketipo pri Dio" estas nur alia nomo por tiu arketipo, kiun Jung analizis kiel la arketipon de la patro. En **Simboloj de Transformiĝo** Jung prezentas la argumentojn ambaŭflanke: la Freŭdan skolon, kiu vidas korporiginon por la "arketipo," kaj firme reduktas ĝin al certa formo de la seksinstinkto. Ni jam bone konas tiun prezenton per la verkaro de Freud mem, speciale **Moseo kaj Monoteismo**. La dua flanko de la argumento estas ke abundas atesto, ke la Freŭda seks-interpreto, kvankam valida, estas nur parto de multe pli kompleksa afero. Li tial formulis kaj analizis la kolektivan malkonscion por montri (kaj tion li faris abunde, en siaj libroj, per miloj da referencoj vortaj kaj bildaj) ke ekzistas en la homo arketiparo kiu estas sendependa de la persona, individua karaktero. Kvankam estus alloge analizi la arke-tipojn nur surbaze de instinktoj, kaj instinktoj grande rolas inter la arketipoj, Jung rifuzis diri ke ĉiu arketipo estas identa kun instinkto(j). Ĉi tie la teologo trovas la anson por teni kaj uzi la aparaton.

Laŭ teologia vidpunkto, projekcio de la arketipo pri Dio, aŭ de la arketipo pri la ideala Memo, nur signifas ke la konscia menso ekkonas kaj agnoskas la ekziston de tiu arketipo. Projekcio ja estas simple rekono pri io kiel aparta de oni mem. Plejofte nin negative impresas "projekcio," ĉar ni kutimas al la situacio ke persono projekcias propran vid-punkton aŭ opinion kaj supozas (erare) ĝin objektive ekzistanta aparte de li. Sed projekcio povas esti afirmativa, se tio kion oni projekcias ja estas objektive ekzistanta ekster la projekcianto. Por doni nur malgrandan ekzemplon ne-religian: estas nepre necese ke la individuo projekciu sian idealon pri vir(in)o sur alian personon, por ebligi edz(in)-iĝon. Psikozo aŭ neŭrozo povas okazi ĝuste ĉar iu ne faras tion, kaj "havas idealon kiun li neniam povus trovi ie en la mondo."[17]

## Carl Jung kaj la Biblio

La psikanaliza studo esploras kaj klopodas ekspliki la funkciadon de la homa menso, nur tion. Neniu evento okazas sen interpreto; por koncepti eventon, ni aŭtomate kaj neeviteble devas interpreti ĝin.

La teologo kiu kredas ke Dio ja enkarniĝis en sia Filo Jesuo Kristo povas facile akcepti kaj utiligi la Jungan analizadon, kiu nur celas ekspliki kiel kaj kial tiu evento estis interpretata kaj influis la mensojn de la personoj en la unua jarcento p.k., kaj nun. Li mem (Jung) ne esprimas propran opinion pri la valideco de la teologia dogmo, ĉar li ne pritraktas ĝin.

Sed la teologo devas esti preta akcepti ke la neteologo, aŭ teologo kun alia opinio, povas same uzi Jungan analizadon. Jung ne estis, kaj ne volis esti, teologo, sed sciencisto. Kiel astronomio, psikanalizo estas scienca disciplino uzebla de ĉiu ajn kaj favoranta neniun.

La bibliisto trovas en la Jung-analizado instrumenton por interpreto kaj laboro pri la Biblio. Ĝi evitas la materialisman kernon kiu tiom karakterizis la Welhausen-evoluisman interpreton pri biblia historio. Ĝi ankaŭ evitas la teologiajn antaŭsupozojn kiuj karakterizas la Bultmann-pritraktadon. En nia epoko kiam la mito-kaj-rito skolo ankoraŭ floras, kaj arkeologio liveras al ni konstante pli da materialo pri la kulturoj de la "proksima oriento," ĝi prezentas al ni manieron uzi la trovaĵojn kaj sencigi kaozan situacion.

* * *

## NOTOJ

1. Vidu, ekz., liajn **The Future of an Illusion, Moses and Monotheism**.
2. Du volumoj dc la "Kolektita Verkaro de Carl Jung" estas dediĉitaj al prireligiaj studoj: volumo **11, Psychology and Religion, West and East;** volumo 9 (parto 2), **Aion.** Vidu ankaŭ, speciale, vol. 5, **Symbols of Transformation.**

3. **Memories, Dreams, Reflections,** 1963.
4. **The Interpretation of Dreams.**
5. **The Psychopathology of Everyday Life.**
6. La plej malnova civilizacio nun konata estas tiu ĉe Jeriĥo, lastatempe studita de Kathleen Kenyon. Por populara priskribo, vidu **Archaeology in the Holy Land** (1960) de Kathleen Kenyon. Ŝi tamen avertas ke ni ne supozu Jeriĥon la originala centro de civilizacio: tiel ŝajnas ĉar aliaj arkeologiaj sitoj estas ankoraŭ ne sufiĉe ekzamenitaj.
7. Pri tio, konsideru la furiozon kiu okazis en teologiaj rondoj pro la apero de **The Semantics of Biblical Language,** de James Barr (1961). Per tre konservativa maniero li prezentis la aplikon de normala lingvistika metodo al la hebrea kaj "bibligreka" lingvoj.
8. Sed la publiko venkis pri terminologio. Freud kaj Jung energie protestis, unue, kontraŭ la nomo "psikiatro," sed ambaŭ dum la lastaj jaroj senĝene aplikis tiun nomon al si. Jung unue protestis kontraŭ la nomo "psikanalizo" por sia sistemo, opiniante ĝin teknika termino por la Freuda sistemo; sed en la lastaj jaroj li rezigne akceptis, kaj uzis, "psikanalizo" ankaŭ por siaj studoj. La ribelon kontraŭ la nomo "psikiatro" kaŭzis la fakto ke ĝi signifis mediciniston kiu konsideras la menson nur korpa funkcio.
9. Pri la Diablo, komparu 1 Kroniko 21: 1 kun 2 Samuel 24: 1 (kio estas en Kroniko atribuata al Satano en 2 Samuel estas atribuata al Dio). Kp. Numeroj 22: 22 (laŭvorte el la hebrea): "kaj flamis la kolero de Dio, ĉar li iris, kaj anĝelo de Jhŭh ekstaris sur la vojo kiel satano por li." Klare tie, satano ankoraŭ ne estas propra nomo, sed ankoraŭ estas ordinara substantivo, "kontraŭulo." La identigo de anĝelo kun Dio, en Judismo, estas tre kutima: vidu, ekzemple, Juĝistoj 6: 22-3, 13: 21-3; Genezo 18. Pli precize parolante, ni dirus ke laŭ la judisma vidpunkto, anĝelo, satano, kc, estas **aspektoj,** aŭ emanaĵoj, de Dio.
10. La interpreto pri Genezo 3 estas jam de longe farita, ke per manĝo de la frukto de la "arbo de sciado pri bono kaj malbono" la homo konsciiĝis, t.e. apartiĝis de la bestoj. Ni ne bezonas interpreti ĉi tion kiel ian proto-evoluisman doktrinon en la Biblio (kvankam tia interpreto de Genezo 2-3 tute ne estas neebla), ĉar la antikva mondo bone sciis ke la homo estas korpe parenca al bestoi, kaj ofte diskutadis pri ĝuste kio diferencigas la homon de besto.
11. Platono atingis saman konkludon, sendepende. Vidu **Leĝoj,** sekciojn 896e-898d.
12. Angla eldono: **Flying Saucers, A Modern Myth of Things Seen in the Skies,** 1959. Jung ne sciis, kaj oni ankoraŭ ne scias, ĉu objektivaj faktoj troviĝas malantaŭ la raportoj pri Flugantaj Teleroj. Sed la raportoj

mem estis interesaj, ĉar ili esprimis mitologiajn motifojn jam familiarajn de jarmiloj. Li do ekzamenis la raportojn mem, ne celante lerni pri fakta karaktero de la Teleroj, sed pri la mensoj de la verkantoj.

13. Por detala ekzameno de ĉi tio, kiel ankaŭ de la Savfiguro ekster la juda religio, vidu **Simboloj de Transformiĝo.**
14. T.e., laŭ la psikanaliza sistemo de Freŭdo, kiu konsideras nur la personan malkonscion kaj ne la kolektivan.
15. El **Respondo al Ijobo,** paragrafoj 647-8 (en la **Kolektitaj Verkoj).** La referenco en la lasta parto de la citaĵo estas al parto de la traktado pri Ijob. Jahŭe, la ankoraŭ ne konscia psiko projekciita, strebas reintegriĝi; t.e., la malkonscio strebas eniri la konscion. Projekcie la rezulto estus nova antropomorfigo de la Di-koncepto.
16. **Phvsics for the Enquiring Mind** de Eric M. Rogers (Princeton University Press, 1960).
17. La ideala figuro projekciata estas, laŭ la terminologio de Jung, nomata la **anima** aŭ **animus (anima,** se projekcias viro; **animus,** se projekcias virino).

La diversaj verkoj cititaj originale aperis en la germana lingvo; kelkfoje la anglaj tradukoj estis reviziataj de Jung mem, kaj ricevis formon iom diferencan de tiu de la germanaj eldonoj. Ĉi tie mi citis la anglajn eldonojn, ĉar ilin mi uzis kaj ne la germanajn.


## FORSCHUNGSSTELLE FUER GESCHICHTE DER SKLAVEREI UND DER HOERIGKEIT

Center of studies for research into the history of slavery and bondage—Centre d'études pour servir a 1'histoire de 1'esclavage et de la servitude.

Kiu interesiĝas pri la supre nomitaj temoj de la socia kaj ekonomia historio, bonvolu skribi al la sekretario de la Forschungsstele, Wien IX/70, Postfach 70, Aŭstrujo. Bonvolu sendi kun ĉiuj demandoj respondkuponojn.

## SKLAVECO EN LA ANTIKVA PROKSIMA ORIENTO

**de ERNESTO JOZEFO GOERLICH**

Sklaveco estis normala institucio ĉe la antikvaj popoloj. Kontraŭuloj kaj militkaptitoj estis estontaj gesklavoj de la venkintoj. Ĉiuj gehomoj sciis ĝin. Neniu atendis alian sorton en la kazo de malfeliĉa fino de milito. Sklaveco estis parto de la socia vivo kaj de la ekonomiaj kondiĉoj de la antikvaj nacioj. Ofte, kiam ni legas en la tradukoj de antikvaj tekstoj — ekzemple en la Biblio, tradukita de Martino Luther — la vorton "servisto" aŭ "servistino" la aŭtoro volas diri "sklavo" aŭ "sklavino". Miopinie la ĝusta traduko de la vorto, "sklavo," en la tekstoj estus pli bona ol la kutima esprimo "servanto" aŭ "servistino" — ĉar multaj gelegantoj de hodiaŭ ne konas la antikvajn tradiciojn kaj la antikvajn sociajn kaj ekonomiajn kondiĉojn, sub kiuj la antikvaj nacioj vivadis.

La ĉefa fonto de la sklaveco estis — ni jam diris supre — la milito. Jen — la plej malnovaj vortoj por gesklavoj en la sumera lingvo signifas "viro el la fremda lando" (= nita + kur) aŭ "virino el la fremda lando" (= munus + kur). Ankaŭ en la homeraj poemoj ni legas, ke kaptitaj virinoj kaj infanoj estas sklavigitaj. La reĝo de Trojo, Priamo, petegas sian filon Hektoron, ke li ne batalu kon-traŭ la potenca Aĥilo, por ke li ne mortiĝu. Ĉar post lia morto la grekoj enirus la urbon kaj post la mortigo de la viroj la virinoj, la knabinoj kaj la infanoj de Trojo estus sklavigitaj. La greka termino por "sklavo" estis ja "Ajĥmalotes" — ĝi signifis unuaflanke la militkaptiton. La leĝoj de la babilona reĝo Hamurabi pritraktas la militkaptecon kaj la sklavecon post la kapto en milito kiel ordinaran kutiman aferon. La kaptito estu liberigita en la nomo de la ŝtato, se li ne havas la eblecon de la liberigo per siaj parencoj.[1] En la kazo, ke la edzino de militkaptita viro ne havas monon, por vivi sen helpo, ŝi havis la

rajton denove edziniĝi.[2] Jen la ideo, ke militkaptita viro estas morta, en la opinio de la komunuma leĝo morta!

Alia fonto de la sklaveco estis la elmeto de infanoj kaj la forkonduko de geknaboj. Ne nur infanoj de fremdlandanaj gepatroj, ankaŭ infanoj el la hejmlando de la rabistoj estis sklavigataj en ĉi tiu maniero. Malriĉuloj vendis siajn gefilojn kiel sklavojn al riĉaj najbaroj. Ofte la gepatroj ne serĉis mastron por siaj gefiloj, sed ili elmetis ilin sur la strato (= ina suqi). En dokumentoj el la nov-babilona tempo ni trovas la esprimon "elmeti la infanon en la buŝon de hundo" (ina pi kalbi). Tiu, kiu trovis elmetitan infanon, havis la rajton uzi la infanon kiel sian sklavon.

Ofte la venditaj infanoj ankaŭ estis adoptataj de siaj mastroj. Junaj knabinoj estis uzataj kiel servistinoj kaj kiel konkubinoj de siaj mastroj. Ni legas en kontrakto el la vivtempo de babilona reĝo Hamurabi: "Bunene-abi kaj Belisunu vendis Shamash-nuri, filinon de Ibbi-Sha'an, de Ibbi-Sha'an, ŝia patro. Bunene-abi uzos ŝin kiel konkubinon, Belisuni uzos ŝin kiel sklavinon. Se Shamash-nuri ne akceptos Belisunu kiel sian mastrinon, tiam oni deŝiros ŝian hararon kaj oni forvendos ŝin. . . ."

La vendo de knaboj kaj knabinoj estis kutima afero en ĉi tiu tempo: la patro vendis sian filon, la frato vendis sian fratinon. Ankaŭ en la Biblio oni trovas la samajn kutimojn. Oni legu ekzemple Eliron 21: 7-11 kaj 2 Reĝoj 4: 1. Jen: "Se viro vendas sian filinon kiel sklavinon, oni ne liberigu ŝin kiel la aliajn gesklavojn" ... kaj "Alveninta estas kreditoro kaj li volas forkonduki miajn du filojn kiel sklavojn!" Ankaŭ de Neĥ. 5: 5 ni estas informitaj, ke malriĉaj kamparanoj vendis siajn gefilojn kaŭze de ŝuldoj. Ĉe la Babilonoj kaj Asiroj ekzistis nur la rekta vendo, en aliaj landoj de la proksima antikva Oriento estis eble, ke oni forvendis siajn filinojn kondiĉe, ke la mastro edzinigis ilin, kiam ili estos puberaj. En ĉi tiu kazo la kont-

rakto konfirmis, ke la mastro de la knabino edzinigu ŝin kiel edzinon al unu el siaj sklavoj kaj ke la knabino restu en la bieno de sia posedanto ĝis la fino de sia vivo. La diferenco inter la du formoj de la vendo estis jena: en la unua kazo la posedanto de la knabino povis fari kun sia juna sklavino, kion ajn li volis — en la dua kazo li estis devigita edzinigi ŝin. La gepatroj antaŭzorgis en la jena ebleco, ke la mastro ne uzu ilian filinon kiel prostituitinon.

Ankaŭ ĉe la hebreoj ĉi tiu kutimo de la vendo de junaj knabinoj ekzistis, ekzemple ni legas en El. 21: 7-11: "Se la sklavino ne konvenas al sia mastro, tiam la patro elaĉetu ŝin. La mastro ne rajtas forvendi la knabinon al fremdulo . . ." Laŭ hebrea leĝo la mastro povis doni la knabinon ankaŭ al sia filo kiel edzinon aŭ li povis ŝin uzi kiel konkubinon mem, sed se li aŭ lia filo ne volis la sklavinon, tiam ŝi estis libera.

Ni trovas ankaŭ en ĉi tiu tempo la moron, ke homoj vendis sin mem. Fremdulo, veninta en la landon kaj sen ebleco, ke li vivadu, zorgis por si en tiu maniero. Ekzemple ni trovas kontrakton[3] jen: "Ur-dukuga, lia edzino Anbuza, Nindada, Ninurrani kaj Ur-Shumah, liaj infanoj, vendis sin mem por la sumo de 2/3 de unu mino kaj 3 ŝekeloj . ." Estis simila afero, se ĉe la hebreoj la sklavo, kiu estu liberigita laŭ la leĝo de Moseo post sep jaroj, deklaris, ke li volis esti sklavo ĝis la fino de sia vivo: ankaŭ maniero de sin-vendo en la sklavecon! Ni trovas la paragrafon en Ex. 21: 1-6.

Ankoraŭ ni volas referi pri alia fonto de la sklaveco en la proksima antikva Oriento: sklaveco kaŭze de ŝuldoj. En jenaj tempoj la procentoj de kapital-mono estis tre multekostaj. La sumera vorto por "procentoj" estas "maŝ", la akada vorto "sibtum". La normaj procentoj estis 20%-25% de la kapitalo. En Asirujo ni aŭskultis pri leĝoj, kiuj difinas la valoron de la procentoj. Pro tio ni trovas tiam procentojn de 80% de la kapital-sumo. Ankaŭ procentoj de 100%, jen

141% estas troveblaj. Ne estas dubo, ke la ŝuldantoj ne povis pagi la ŝuldojn. En ĉi tiu kazo unue la edzino kaj la gefiloj de la ŝuldanto estas sklavigitaj, post tio la ŝuldanto mem. Ĉi tiu kutimo ekzistis ankaŭ en la aliaj antikvaj landoj, ekzemple en Grekujo kaj en la plej antikvaj tempoj de la Roma ŝtato. En tiu maniero ofte liber-naskigitaj gehomoj estis sklavigitaj. La sama leĝo ekzistis ankaŭ ĉe la hebreoj. Ni legas en la Biblio (2 Reĝoj, 4: 1-2), ke la vidvino alvenis al la profeto Eliŝa kaj informas lin, ke la pruntedoninto venis, por forkonduki ŝiajn du infanojn. En Palestino la kreditoro forprenis la landon kaj la kampojn kaj la infanojn de la ŝuldanto, se ĉi tiu ne povis pagi sian ŝuldatan monsumon. Sed en la Biblio kaj en la babilona Hamurabi-leĝoj la daŭro de la sklaveco kaŭze de nepagita ŝuld-monsumo ne estas senfina. En Babilono la ŝuldanto, ankaŭ liaj infanoj kaj edzino, restas dum tri jaroj en sklaveco, en Palestino dum ses jaroj.

La jura stato de la gesklavoj en la antikva proksima Oriento estas la stato de vivanta kaj parolanta aĵoj. Ankaŭ la greka filozofo Aristotelo opiniis, ke sklavoj estas “parolantaj aparatoj”. La leĝoj ne rigardis la gesklavojn kiel homojn kun homaj rajtoj. Pro tio la mastro havis la rajton traktadi la gesklavojn laŭ sia volo. Se li mortigis unu el siaj gesklavoj neniu leĝo kondamnis lin. Se li mortigis la sklavon de alia mastro, li estis kondamnita kompensi la valoron de la mortigita sklavo, ne la homon, sed nur la valoron de la laborkapableco de la mizerulo. La sklavo devis obei al la mastro senkondiĉe. Li devis labori, kiel kaj kie la mastro ordonis. La mastro povis puni lin, ankaŭ sen kaŭzo. En la antikva proksima Oriento valoris la sama kutimo kiel en antikva Romo, kie la Roma aŭtoro Juvenalo skribis en unu de siaj satiroj, priskribante la manieron, en kiu Roma sinjorino de lia vivtempo punis siajn gesklavojn. Demandite, ĉu la punita sklavo estis kulpa, ŝi respondis: Tia estas mia ordono, tia estas mia volo, mia volo

anstataŭas sagacon (Sic volo, sic jubeo, stat pro ratione voluntas).

Pro tio la gesklavoj ne havis rajton esti patroj aŭ patrinoj. La sklavvendisto vendis la infanojn sen gepatroj, la gefratojn sen gefratoj, la patrinojn sen filoj, laŭ sia volo kaj laŭ la volo de la aĉetantoj. Cetere, en jenaj tempoj, la plej granda parto de la vendataj gesklavoj estis virinoj, knabinoj kaj infanoj. Ekzemple ni havas dokumenton el la vivtempo de la reĝo Nabonido, en kiu oni forvendis kvarjaraĝan knabinon.[4] La mastro de la novaĉetita sklavo brulmarkis lin. Jen moro, kiun ni trovas jam en la Babilono dum la vivtempo de reĝo Hamurabi (vidu paragrafojn 146, 226 kaj 227). Se sklavino estis la konkubino de la mastro kaj ŝi estis fiera pro tio, la edzino de la mastro havis la eblecon, la fieran virinon brulmarki kiel signon de ŝia sklaveco. Similan aferon ni aŭskultas en Biblio en la familio de Abrahamo, kiam la sklavino Hagaro ofendis Sara'on, la legitiman edzinon de Abrahamo.

Parolinte pri Hagaro ni pritraktu la kutimojn de la antikva proksima Oriento koncerne la sklavinojn. Ĉar la ina sklavo havis ne nur la ordinarajn devojn de sia sklava kamarado, ŝi estis ankaŭ ino. Jam sur la sklav-bazaro oni ofendis la ĉastecon de la knabino. La aĉetonto inspektis la venontan sklavinon detale. La knabino kaj la virino estis nudaj. Ili sciis, ke la mastro havas la rajton, ilin senhonorigi, ankaŭ per forto, se ili ne volis toleri la malhonoron. La devoj de la sklavino — ĉefe de la juna sklavino — estis duoblaj: obei al la mastrino kaj labori por ŝi, kaj nokte kuŝi kun la mastro aŭ la filoj de la mastro, se ili vokis ŝin. Jen ĉi tio estis la plej bona stato por juna sklavino. Ofte la mastro ne uzis ŝin kiel sian konkubinon, sed li ordonis ŝin, ke ŝi kuŝu kun iu ajn el la sklavoj de la mastra bieno, por ke ŝi nasku infanojn, kiuj estos ankaŭ gesklavoj de la mastro. Neniu demandis la mizerulinon, ĉu ŝi amas la edzon, al kiu oni pruntedonis ŝin. Tiumaniere oni pruntedonis la sklavinon ĝis ŝi ne povis plu naski infanojn.

**SKLAVECO EN LA ANTIKVA PROKSIMA ORIENTO**

La traktado de la gesklavoj estas diversa: ĝi estis posedaĵo de la mastro. Pro tio ne estas eble pritrakti la aferon ĝenerale. Certe, ekzistis mastroj, kiuj estis favoremaj al siaj gesklavoj (ĉefe se ili amis unu el siaj sklavinoj), sed aliflanke ankaŭ kruelaj mastroj ekzistis sendube. La plej granda garantio kontraŭ malbona traktado estas la monsumo, kiun la mastro pagis por la sklavo. Ĉar la prudenta mastro ne forpelis aŭ detruis valoran aĵon, kia ankaŭ la sklavo estis. **Nur en Palestino, ĉe la hebreoj la pritraktado de la gesklavoj estis pli bona. Sendube oni pritraktis ilin en la plej favorebla maniero, kiun ni konas el la antikvaj tempoj.**

**NOTOJ**

1. vidu Para. 32, 133-135.
2. vidu Pars. 32, 133-135.
3. vidu A. Pohl: Rechts-und Verwaltungsurkunden der III. Dynastie von Ur, nro. 53.
4. vidu J. N. Strassmaier: Inschriften von Nabonidus. 196 (in: Keilschriftliche Bibliothek) 4, p. 222 nro. 18.

## AL LA LEGANTOJ

La redakcio deziras peti la pardonon de la legantoj, ke la amplekso de ĉi tiu numero estas malpli granda ol la promesita. Presproblemoj en la presejo kiu kontraktis pretigi la gazeton devigis nin lastmomente presigi ĝin ĉe alia entrepreno. La amplekso de postaj numeroj estos, kiel indikite, 80 paĝa.

## LA KOMISIIĜO DE PETRO

**de RODNEY E. RING**

Mateo 16: 17-19: "Kaj Jesuo responde diris al li: Feliĉa vi estas, Simon Bar-Jona; ĉar ne karno kaj sango tion malkaŝis al vi, sed mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Kaj mi diris al vi, ke vi estas Petro, kaj sur ĉi tiu roko mi konstruos mian eklezion; kaj pordegoj de Hades ne superfortos ĝin. Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo; kaj kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo; kaj kion ajn vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo."

### I.

Ĉi tiu elĉerpaĵo de la evangelio de Sankta Mateo, kiu sin trovas nur tie, havas grandan gravecon inter kristanoj. Ĝi bonŝance ne havas tekstoproblemojn: En la dek sepa verso la kodekso Korideti, kaj la grupo el la sepa ĝis la naŭa jarcento (EFGHSVY kaj von Soden e61 malkunigis Bariona al Bar Jona, sed el tiu ĉi malsama literado ne estas signifodiferenco. En la sama verso la Vatikana Kodekso ne havas la artikolon kun "ĉielo," kaj estas ankaŭ multaj malakordoj en vorto-aranĝado en la dek naŭa verso je, "Mi donos al vi . . .," sed neniu varianto aŭ ortografio faras inter ni malkonsenton.

### II.

Multaj homoj diras ke la problemo estas la identigado de la roko, kaj pensas ke la eklezio estas konstruata sur la tuj antaŭa Konfeso de Petro, kaj ne sur la homo mem. Kvankam Petro ja estas la unua homo kiu per inspiro faris la konfeson ke Jesuo estas la Kristo, ili diras ke la Mateo-Evangelio volas diri ke la eklezio estas konstruata sur Kristo mem. Ili citas pecojn de Sankta Skribo mem por montri ke aŭtoroj de la Nova Testamento konsentas. Sed laŭ mia opinio ili eraras en la aserto pri la Evangelio de Sankta Mateo. Estas multaj kaŭzoj, sed mi citos nun nur du kialojn: Unue, la Greka teksto estas klara kaj la

gramatiko montras ke Jesuo parolas per singularaj verboj kaj pronomoj en la dua persono al Petro sola, kaj volas konstrui sian eklezion sur li. Due, la kunteksto de la Mateo-Evangelio postulas ĝin, ĉar Petro devas paraleliĝi al la ĉefsacerdoto de Judaismo. En la granda komparo, kiu estas la tuta Evangelio laŭ Mateo, ni vidas ke: ili havas Moseon, kaj ni havas Jesuon; ili havas kvin librojn de leĝoj, ni havas kvin predikojn de Jesuo; ili havas estro-sacerdoton, kaj ni havas ankaŭ estro-sacerdoton — Petron! Li estas ja en la Mateo-Evangelio la roko sur kiu Jesuo diris ke li konstruos la novan socion en la maniero de Jesaja (8: 16). Li ligos la ateston, sigelos la leĝon ĉe siaj lernantoj! Estas sendube ke Petro kompariĝas al alt-sacerdoto.

## III.

Aliaj studantoj insistis ke la problemo estas la ŝlosiloj, kiujn Jesuo donis al li. Ĉiuj konsentas ke ligi kaj malligi signifas pardoni aŭ nepardoni, sed multaj kristanoj mal-trankviliĝis ke tiel granda povo kaj potenco estus en la manoj de unu homo! Eĉ se Jesuo donis la ŝlosilojn (kun singulara pronomo) al unu persono, ili insistas, restas problemo! Sed ĉi tie ree mi defendas Mateon. Estas tri gravaj kialoj: Unue, ĉar ni vidis ke Petro laŭ Mateo estas la angulo-ŝtono de la komunumo nova, la roko sur kiu, en la estonteco, konstruiĝos la eklezio, la estro de la disĉiploj, ne ekzistas do **a priori** kontraŭaĵo al donado al li de la rajtigo ligi kaj malligi. Estus ja pli strange en la kunteksto de la analogeco se li ne havus difinitan kaj precizan funkcion. La Hebrea ĉef-sacerdoto ja havas sian propran funkcion!

Due, la sama forto de la ŝlosiloj en la sama evangelio doniĝos baldaŭ al unu grupo, t.e., al la tuta mondo de kris-tanoj! Post nur du ĉapitroj (18: 18) li donas la fortecon al grupo, kaj la verboj nun estas en la plurala dua persono. Neniu teksta varianto sin trovas ĉi tie, kvankam unuj

manuskriptoj aldonas la vorton “amen” en verso deknaŭ. La Aleksandrino kaj “Bezae Cantabrigiensis” havas simplan futuron anstataŭ la subjunktivo, sed ĝi ŝanĝas nenion. En la dudeka verso la negativo en la unua parto estas klarigita per Bezae: “Ne estas du aŭ tri en mia nomo kunvenintaj, inter kiuj mi ne estas inter ili.” La duobla uzo de la negativo klarigas ĝin, eĉ en aliaj manuskriptoj malsimilaj.

Trie, ĉiuj duboj pri la malbonuzo de la forto de la ŝlosiloj foriĝas en la sekvaj versoj, kiam la sama Mateo-Evangelio klarigas la uzon per la demando de Petro mem (18: 21), “Sinjoro, kiomfoje povu peki mia frato kontraŭ mi, kaj mi pardonu lin? Ĝis sep fojoj?” La respondo de Jesuo ne estas leciono aritmetika, sed estas deklaracio ke la rajtigo de la ŝlosiloj, ĵus donita al grupo, ne estas privilegio nek privata prerogativo, sed estas vere la devo granda: ĉiu membro de la komuno kristana devas pardoni sian fraton ĉiam, kiam la frato petas.

**IV.**

Tiu ĉi estas la kompletigo de la ŝanĝo en inter-rilatoj homaj, kiu komenciĝis kun principo de venĝo senlima en la antikva estinteco! Ĝi ŝanĝiĝis al lima venĝo per la “Lex Talionis” (Animon pro animo; okulon pro okulo; denton pro dento; manon pro mano; piedon pro piedo, bruldifekton pro bruldifekto; vundon pro vundo, kontuzon pro kontuzo), kaj nun ĝi estas inversita al principo de pardono senlima!

**V.**

Restas nur unu vorto pri la temo de la komisio de Petro: Ne estas io en la Evangelio de Mateo, ja en la Biblio Sankta, kiu sugestias ke pli ol unu Petro iam sin trovas. La “Succesio Episcoporum” ne estas afero de studo Biblia, sed afero de ne-Biblia koncerno, kaj de kredo, kaj de fido. Estus mi mem surprizegita se unu konstruaĵo havus pli ol du cent sesdek angulo-ŝtonojn!